


Revuo
ESPERANTO
Internacia

N-ro 543 (2) FEBRUARO 1951



Dee-bank rivero, Muskoka, Ontario, Kanado
(vidu p. 43)



El la Oficejo

44a Jaro

Februaro 1951

N-ro 543 (2)

Dankon al la 1250 membroj, kiuj pagis sian kotizon por 1951 jam antaŭ la fino de dec. 1950. Tiu antaŭpago multege helpas al la rutina prilaboro de la administrado, ekspedo de gazetoj k.s. krom la fakto, ke estas pli facile plani kun jam aliĝinta membraro.

La Propagandilo *Momenton mi petas!* havis grandan sukceson en la pasinta jaro. U.E.A. pretigis novan varbfolion kun multaj informoj pri nia Asocio. Ni volonte sendos tiun folion al petantoj aŭ al indikitaj adresoj. Petante kvanton, nepre indiku la ĝustan nombron, kiun vi deziras.

La nuna gazeto kun 32 paĝoj estas bona, sed ni ne estas kontentaj je tio. Ni ambicias pli imponan revuon, tian, kiu povos konkuri kun naci-lingvaj eldonoj. Kun via helpo kaj kunlaboro ni povos eldoni 64-paĝan numeron. Do varbu viajn amikojn!

Kunlaborantoj en la gazeto ofte kaŭzas al ni nenecesan penadon. Kiam vi sendas al ni tradukon aŭ artikolon kun fotoj, nepre antaŭzorgu, ke vi ricevis la permeson de la posedanto de la kopirajto. Ni ne rajtas publikigi ion sen tiu permeso.

Salutojn !

Ĉi-jare envenis en la Centran Oficejon de U.E.A. nekutime granda nombro da salutkartoj kaj leteroj okaze de la kristnaska festo kaj la nova jaro. La Ĝenerala Sekretario kaj personaro deziras esprimi al ĉiuj salutintoj, kaj al ĉiuj gesamideanoj tre sincerajn bondezirojn kaj esperon ke en 1951 trafos niajn kolegojn feliĉo, prospero kaj paco.

Oficiala organo de
Universala Esperanto-Asocio

Fondinto : H. HODLER

Redaktoro : HANS JAKOB

Helpredaktoro : MASON STUTTARD

Ĉion por la redakcio sendu al
ESPERANTO
Palais Wilson, Genève, Svis.

Traduko kaj represo de artikoloj estas permesataj, kondiĉe ke oni citu la fonton. Oni sendu tian represaĵon al nia redakcio.

Ĉion pri administrado de UEA kaj de la revuo ESPERANTO, abonado, reklamoj, anoncetoj sendu al

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO
Heronsgate, Rickmansworth, Herts.,
Anglujo

Jara abono : 8 ŝil. anglaj (kun membreco kaj jarlibro 12ŝ. 6p.)

Ĉefdelegitoj kaj Perantoj en multaj landoj

Tarifo por reklamoj :

1 paĝo £6	½ paĝo £3
¼ paĝo 30 ŝil.	⅓ paĝo 15 ŝil.

Anoncetoj pri korespondado :

2 pencoj por unu vorto aŭ 1 int. respond-
kupono por ĉiu duo da vortoj

Legantoj en 74 landoj

Kiu venis la unua—



La kokino aŭ la ovo?

TIU duonŝerca biologia demando, ofte farita en mia junaĝo, iom kongruas kun nia problemo rilate al la gazeto de nia U.E.A. Kiu fakte venas la unua : la *legantaro* aŭ la plibonigita *revuo* ?

La nuna numero de *Esperanto* estas la dua laŭ la nova formato. Vi certe rimarkis, ke la 32 paĝoj (kun kovrilo) ŝajne enhavas pli da materialo ol kutime enhavis la malnova gazeto. En tiu supozo vi pravas. La nunaj 32 paĝoj entenas tiom da materialo, kiom 21 paĝoj laŭ la malnova formato ; kaj en 1950 ĉiu numero havis 16 paĝojn (kun unu-du esceptoj).

Sed, vi murmuras al vi, la MA-kotizo ne plialtiĝis ! Kiel tio eblas ?

Tio parte ŝuldiĝas al la formato mem, ĉar la preskostoj de la nuna revuo estas proksimume samaj, kiel de la malnovformata, kvankam vi ricevas pli da legmaterialo. Parenteze, eble interesos vin scii, ke la kosto de unuopa numero de nia revuo estas proks. 160 anglaj pundoj, inkluzive de afranko, sed sen kalkulo pri la redaktaj kaj administraj laboroj, kiuj estas konsiderindaj.

Krome, reklamoj helpas pagi la kostojn, kaj tial ni bonvenigas kaj dankas la kunlaboron de legantoj je akiro de taŭgaj reklamoj. Simile legantoj subtenu la reklamintojn. Kontentaj reklamintoj inklinas denove reklami ! Dek paĝoj da reklamoj ĉiumonate ebligus al ni liveri multe pli grandan kaj multe pli imponan revuon. Ĉu vi rimarkis la “libro-numeron” de pasinta novembro kun 24 paĝoj ? Tio eblis nur pro la reklamoj.

Jam de longe legantoj petis pli da bildoj. Tamen la kosto de fototipioj (galvanoj) estas alta. Malgranda bildo 6×8cm. kostas 25 ŝilingojn (=2 MA-kotizojn !), sed se ni povas samtempe kaj samformate galvanigi kelkajn fotojn la kosto estas malpli. Ĝuste pro tio ni devas plani nian “bild”-ekonomion plurajn monatojn antaŭe. Se ni tamen povas prunti fototipiojn aŭ galvanigi fotojn denove uzeblajn, tio ŝparas monon.

Ni do revenas al nia demando : Kiu venas la unua, la *legantaro* aŭ la *revuo* ? Multjara sperto supozigis al ni, ke en Esperantujo oni devas atendi unu jaron antaŭ ol vidi konkretajn rezultojn rilate al gazeto, kaj oni staras antaŭ la paradokso, ke sen legantaro oni ne disponas la necesan kapitalon, kaj sen kapitalo oni ne akiras la legantaron ! Tamen pasintjare ni komencis klopodi pri plibonigo de nia revuo, kaj jam nun la rezultoj estas videblaj. Ni konstatas, ke jam en la fino de 1950 proks. **1250** personoj antaŭpagis sian MA-kotizon por 1951 (kompara cifero por 1949–50 estis 750 !) kaj en 1950 la forfalo de membroj (grava problemo de ĉiu organizaĵo) estis malpli ol iam antaŭe. En 1951 ni faros eksterordinarajn klopodojn per nia organo, sed la fakta rezulto dependas de vi, la legantaro. Ju pli granda la *legantaro*, des pli bona la *revuo* !

A. C. Oliver, Estrarano.

Notu : La C.O. volonte sendos provekzempleron de la gazeto al iu ajn samideano, se vi bonvolos indiki ties nomon kaj adreson.

UNESKO

konfirmas la valoron de la Esperanto- movado

*Kopio de letero sendita al S-ro E. D. Durrant,
U.E.A.-komisiito por UNESKO-aferoj.*

Kara Sinjoro Durrant,

Dankon pro via letero de 31-a julio 1950 kaj pro N-roj 534/5/6/7 de *Esperanto* enhavantaj resuman tradukon en Esperanto de serio de artikoloj de R. Calder pri *Homoj Kontraŭ la Dezerto*.

Ni estas tre dankaj al vi, ke vi tiel atentigis al la Esperantistaj legantoj ĉi tiun projekton efektivigitan de la Nacia Komisiono de Britujo por UNESKO.

Mi esperas, ke vi ricevis informon pri la vizito de grupo de viaj Kongresanoj al UNESKO-domo, kiu, miaopinie estis sukceso. Via impona kongreso en Parizo donis al ni okazon konstati, kiom valoraj aliancanoj viaj membroj estas en la movado por internacia interkomprenado kaj en la tasko konstrui remparojn de paĉo en la spiritoj de la homoj.

Sincere via,

Vladimir Hercik,

Ĉefo, Rilatoj kun neregistaraj organizaĵoj.



Tra la Mondo Esperantista



Aŭstrujo

Landa Kongreso : La kongreso de Aŭstria Esperantista Federacio okazos 29 jul.–2 aŭg. en Innsbruck. Interesatoj sin turnu al : A.E.F.

Britujo

Landa Kongreso : La 35-a Brita Kongreso de Esperanto okazos 11–14 majo 1951 en Ipswich, Anglujo. Tiu urbo estas facile atingebla el Harwich (Kontinenta Kajo) kaj Londono (90 min. per vagonaro). Ĉiujn informojn de : 35a Brita Kongreso de Esperanto, 65 Tuddenham Road, Ipswich, Suffolk, Anglujo.

Enlanda propagando : En la lastaj monatoj je iniciato de S-ro P. L. Wright—reprezentanto de U.L. en Britujo — multa propagando estas farita. Krom personaj vizitoj kaj prelegoj, S-ro Wright pretigis cirkulerojn, kiujn li disponigas al lokaj societoj kaj aliaj. Tiuj dissendas la cirkulerojn al diversaj societoj en sia loko. Konkreta rezulto estas grandnombra petado pri prelegantoj pri Esperanto. Imitinda agado.

Radio-dissendo pri Esperanto : La 27an de dec. S-ino J. W. Langtree, ano de U.E.A., faris en la okcident-regiona stacio de la B.B.C. dekminutan paroladon pri Zamenhof kaj lia verko. Tio okazis en la kadro de ĉiusemajna serio prezentanta la vivon de eminentaj homoj.

Grava konsultverko listigas Esperantajn librojn : Unu el la plej gravaj konsultverkoj por la fakano en literaturo, eldonado, bibliotekoj k.s. estas la *Reference Catalogue of Current Literature* (Konsulta Katalogo de Aktuala Literaturo). En la eldono 1951 oni listigas 53 verkojn eldonitajn de The Esperanto Publishing Company Ltd., Rickmansworth.

Italujo

Grava sukceso en la radio : La instancoj de la itala radio faris grandan favoron al la Esperantomovado, disponigante tempon por Esperantlingva dissendo en la unua dimanĉo de ĉiu monato. Tiu dissendo portas la nomon : *Viva Esperanta gazeto de la itala radio*, kaj ĝin redaktas S-ro L. Minnaia, ĉefdelegito de U.E.A. por Italujo. La unua numero, la 7-an de jan. konsistis el saluto, literaturaĵoj, tra la mondo Esperantista, recenzoj, leterkesto. S-ro Minnaia intencas dediĉi la unuan numeron de februaro al U.E.A.

Saluto de U.E.A. en radio : La 31 dec. la samideanaro aŭdis inspiran alvokon kaj saluton de Vicprezidanto D-ro P. Kempeneers. La tekston legis S-ro L. Minnaia.

Estas dezirinde, ke ĉi tiu stacio, kiu nun montras grandan simpatian por nia ideo, ricevu plejeble grandan apogon de la Esperantista popolo. Aliaj stacioj malaperis el la listo de uzantoj de Esperanto, kaj en ĉiu

okazo oni menciis apation de la Esperantista publiko. Zorgu, ke la laborantoj en Italujo ricevu vian varman kaj aktivan subtenon!

Maroko

Radio-dissendo en Esperanto: La 26 dec. Radio Maroka dissendis la unuan propagandan paroladon pri Esperanto. Ĝi daŭris kvaronhoron, kaj okazis en la franca lingvo. Subtenu per via gratulo ĉi tiun iniciaton.

Norvegujo

Jubileo: La 27 jan. Norvega Esperantista Ligo festis sian 40-jaran ekziston. Okazis festa kunveno de Klubo Esperantista en Oslo. La unua klubo fondiĝis en 1906 en tiama Kristiania (nun Oslo). La unua Esperantisto estis Haldor Midhus jam en 1900. N.E.L. fondiĝis en 1911 laŭ iniciato de S-ro S. Engesgaard Christie, kiu fariĝis la unua prezidanto.

La gazeto fondiĝis en 1909 kun titolo *Norvega Esperanto Gazeto*, sed poste ĝi nomiĝis *Norvega Esperantisto*. Ĝi ĉesis aperi en 1914. La unua mondmilito tre malfortigis la movadon enlandan kaj nur ĉirkaŭ 1930 ĝi revigliĝis. En 1922 oni reeldonis la gazeton sed ĝi vivis nur unu jaron. Vizito de Andreo Cseh en 1930 enkondukis novan floradon kaj tion helpis instruo de D-ro Ottnar Fischer, lektoro Henrik Seppik kaj diversaj norvegoj. La gazeto reaperis en 1932 kun nomo *Esperantobladet* kaj denove ŝanĝiĝis al *Norvega Esperantisto* en 1950. Ĝi nun estas redaktata sole en Esperanto. En 1945 oni fondis akcian societeton eldonan *Esperantoforlaget A/S* kun kapitalo de 25.000 kronoj.

La norvega radio neniam estis favora al Esperanto, sed dum 1928-29 okazis kurso. Dum oktobro 1950 okazis en la radio diskutado inter filologiaj profesoroj D-ro Alf Sommerfelt kaj D-ro Hans Vogt kun muzea kuratoro Carl Støp-Bowitz, prezidanto de N.E.L., pri la internacilingva problemo. La rezulto estis favora por Esperanto.

Eksterlanda instruisto: En septembro S-ro Tiberio Morariu el Stockholm entreprenis viglan propagandan agadon kaj kursgvidadon en Narvik, konata turistloko 320 km. norde de la polusa cirklo. Grandan sukceson havis la lecionoj kaj prelegoj. Similan agadon oni entreprenis en Tromsø en nov./dec. kun kontentiga penetro en lernejoj rondo.

Japanujo

Esperanto en sanatorioj: Dank' al mallonga artikolo de S-ino Mikiko Wada aperinta en revuo por tuberkulozuloj *Hoken Dōnin*, komencis lerni Esperanton kelkcent malsanuloj, kaj en dekelke da sanatorioj Esperanto-grupoj estas organizitaj. Tiuj malsanuloj deziras korespondi kun alilandanoj, samsortuloj aŭ aliaj samideanoj. Skribu al: Hoken Dōnin, Misaki-tyō 1, Kanda, TOKIO, aŭ al Japana Esperanto-Instituto, Hongo-Motomati, TOKIO. La gazeto havas de la oktobra numero rubrikon de Esperanto.

Urugvajo

Zamenhof-tago: Okaze de la datreveno de la naskiĝo de D-ro Zamenhof la urugvajaj Esperantistoj en Montevideo kuniĝis en komuna tagmanĝo. Oni samtempe honoris S-ron Prof. Fernández Menéndez, tradukinton de la majstroverko *Ariel* de José E. Rodó, la unua verko de urugvaja aŭtoro eldonita en Esperanto en Urugvajo.

Prof. D-ro Ivo Lapenna :

Nekontentiga stato de nia propagando

TUJ post la 35-a U.K. de Esperanto, la Propaganda fako de U.E.A. ekklopodis realigi la decidojn de la Komitato pri plivigligo de la propaganda laboro. Pluraj cirkuleroj kaj leteroj estis senditaj al ĉiuj landaj kaj fakaj asocioj. La Propaganda fako donis detalajn sugestojn koncerne la organizon de propagandaj centroj en diversaj landoj, ilian rolon, la manieron de kunlaborado. Ĝi aparte insistis pri la okazigo de grandstila Esperanto-semajno en ĉiuj landoj, kaj ĝi firme esperis, ke la landaj asocioj—kies oficialaj reprezentantoj en la Komitato de U.E.A. *ĉiuvoĉe* akceptis tiun decidon—fakte klopodos realigi ĝin. Fine, dezirante ricevi klaran bildon pri la stato de nia propagando en mondaj kadroj, la Propaganda fako dissendis al 38 landaj kaj fakaj asocioj, apartan demandaron kaj ĝi petis la respondon plej malfrue ĝis la 1-a de Decembro 1950.

Al tiu demandaro respondis ĝis la 25-a de Decembro la norvega, ĉeĥoslovaka, franca, germana, brita kaj itala landaj asocioj. Krome respondis ankaŭ du fakaj asocioj: Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj kaj Internacia Ligo por Esperanto en P.T.T. La aliaj, bedaŭrinde, tute ne respondis kaj tiamaniere ili malebligis la kunmeton de kompleta trarigardo pri nia aktiveco.

Kvankam, do, la Propaganda fako ne povas analizi la ĝeneralan staton sur la kampo de disvastigo de la Internacia Lingvo, ĝi tamen povas publikigi almenaŭ kelkajn informojn, kiuj, espereble, estos interesaj por la legantoj kaj iom pripensindaj por la

gvidantoj de niaj asocioj kaj societoj. La subaj informoj kaj ciferoj rilatas *nur al la periodo de la 1-a de Aŭgusto ĝis la 15-a de Decembro 1950.* La Esperanto-asocio de Ĉ.S.R. donis raporton, kiu koncernas la laboron de nur 41 grupoj (el 81 ekzistantaj), ĉar la aliaj ne estis respondintaj ĝustatempe al ĝia enketo.

Jen, kiel prezentiĝas la propaganda laboro laŭ la diversaj branĉoj :

Apartajn propagandajn centrojn fondis la norvega, franca, germana kaj itala landaj asocioj. La taskoj de la centroj estas direkti la tutan propagandan laboron en la koncernaj landoj, havigi al la grupoj konvenan propagandan materialon, organizi gazetaran servon, esti en kontakto kun la Propaganda fako de U.E.A.

Esperanto-semajnon organizis nur la franca kaj la germana landaj asocioj. La franca organizis ĝin en 49 urboj kaj al ĉiu organizinto ĝi dissendis jam pretan prelegon, plurajn informojn por la loka gazetaro, sufiĉan kvanton da flugfolioj (tri specoj) kaj afiŝoj, diversajn aliajn propagandilojn (ŝildetojn, glumarkojn, broŝuretojn k.t.p.) La germana asocio ne povis raporti, ĉar la Esperanto-semajno okazis nur meze de Dec.

Gazetaran servon organizis la norvega, la germana, la franca, la ĉeĥoslovaka kaj la itala landaj asocioj. La norvega asocio dissendas ĉiun duan semajnon la informojn al 200 taggazetoj. Ĉirkaŭ 70% de la gazetoj akceptas la informojn, ĉ. 12% estas presataj, tiel ke entute aperis ĉ. 700 informoj pri Esperanto dum la tuta

jaro. La ĉeĥoslovaka asocio aperigis 64 artikolojn en 40 gazetoj, la germana pli ol 200 artikolojn en 80 gazetoj, la itala ĉ. 50 artikolojn en 40 gazetoj, la franca ĉ. 300 artikolojn kaj informojn en ĉ. 80 gazetoj.

Radioprelegojn en nacia lingvo pri Esperanto sukcesis aranĝi la norvega (1), la ĉeĥoslovaka (28), la germana (8) kaj la franca (ĉ. 70) landaj asocioj.

Publikajn prelegojn aranĝis la brita, franca, norvega, ĉeĥoslovaka kaj germana landaj asocioj. Entute en tiuj landoj okazis 176 prelegoj, kiujn ĉeestis ĉ. 13.000 personoj (kelkaj ciferoj mankis, do nekompleta).

Broŝurojn kaj flugfoliojn disdonis la ĉeĥoslovaka (54.000), la germana (4.000) kaj la franca (ĉ. 30.000) landaj asocioj.

Afiŝojn publikigis la ĉeĥoslovaka (3.500), la germana (800) kaj la franca landaj asocioj.

La du menciitaj fakaj asocioj faras konstantan propagandon en koncernaj medioj (instruistaj kaj PTT-oficistaj).

Pri la novaj kursoj povis raporti nur la norvega (12 kursoj kun 200 lernantoj), la ĉeĥoslovaka (52 kursoj kun 1117 lernantoj) kaj la germana (101 kursoj kun 1.600 lernantoj).

* * *

La farita enketo, kvankam terure manka, tamen estas treege instrua el pluraj vidpunktoj. Ĝi klare montras, ke :

(1) Nia tuta aktiveco sur la propaganda kampo estas ankoraŭ tre neorganizita. La fakto, ke el 38 enketitoj nur 8 respondis pravas plej evidente ĝis kia grado nia laboro restas ankoraŭ sen kunligiteco kaj sen reciproka helpo.

(2) Principe en ĉiu lando, kie ekzistas niaj organizaĵoj, oni povas fari bonan laboron. Oni devas nur *voli kaj persisti*. Precipe la organizo de taŭga gazetara servo ebligas konstantan informadon de la publiko pri nia afero. Estas malpli vere, ke la gazetoj volas nenion aperigi pri Esperanto. Estas multe pli vere, ke ni nenion sendas al la gazetoj pri la Internacia Lingvo !

(3) Bona propaganda laboro nepre rezultigas kontentigan alfluron de novaj lernantoj.

(4) La progresado de nia afero estas grandparte rezulto de nia propra agemo, dum la stagno aŭ eĉ malprogresado estas, same tiel, grandparte kaŭzita de nia propra neagemo !

La Propaganda fako de U.E.A. esprimas siajn gratulojn al la landaj asocioj, kiuj komencis realigadi planan laboron sur tiu ĉi grava kampo. Ĝi esperas, ke la aliaj asocioj sekvos ilian ekzemplon kaj ĝi promesas al ĉiuj sian plenan subtenon. Baldaŭ estos forsendita al la landaj kaj fakaj asocioj nova enketfolio. Estas pli ol dezirinde, ke ĉiuj respondu, por ke ni ĉiuj havu, fine, klaran bildon pri la nuna stato de nia afero. Nur tiel ni povos decidi pri la vojo irota en la estonteco kaj pri la metodoj aplikotaj. Nur tiel la kunveno de reprezentantoj de diversaj propagandaj centroj, okazonta dum la 36-a kongreso, povos doni bonajn rezultojn.

Noto : Post kiam la supra teksto estis jam kompostita, alvenis du pluaj raportoj : de Kroatia Esperanto-Ligo kaj de Nederlanda Esperanto-Asocio LEEN. Ni bedaŭras, ke ili ne povis esti utiligitaj, des pli ke en ambaŭ landoj estis farita gratulinda propaganda laboro, precipe per prelegoj, broŝuroj, flugfolioj kaj ekspozicioj.

J. Régulo Pérez :

El la Kanaria Insularo


La Palmo, lando de kontrastoj

KION la klasikuloj nomis *Feliĉaj Insuloj* aŭ *Elizeaj Kamparoj* okupas trean malmulton de la tera surfaco. Fakte ĝi konsistigas insularon, kiu estas parteto de Afriko, ĉe ties nordokcidenta flanko, sur la Atlanta Oceano. Kiam tiuj insuloj, post nomataj Kanarioj, ekeliris el sia poreŭropa nekonateco dum la XV-a jarcento, ilin posedis enlandanoj, kiuj estis forgesintaj la navigarton kaj ne konis metalojn; ili estis do veraj ŝtonepokuloj. Tiuj enlandanoj ankoraŭ hodiaŭ estas etnologia

enigmo, kvankam ili postlasis sufiĉe abundan kaj diversan ceramikaĵaron, kelkcent vortojn (ĉefe loknomojn) kaj frazojn kaj aliajn kulturajn restaĵojn, kiuj tamen ne sukcesis doni etnologian ŝlosilon al ĝisnunaj sciencaj esploroj. Ĉio pripensigas pri apudafrika antaŭaraba originejo, sed la malmulto, kion oni konas pri la antaŭaraba kontraŭ-kanaria afrika kulturo ne permesas ĝis nun eltiri nekontesteblajn konkludojn.

La eŭropa konkero de Kanarioj daŭris la tutan XV-an jarcenton. La kultura supereco de la konkerintoj baldaŭ sufokis la rudimentan vivmanieron de la enlandanoj. Al tio aldoniĝas, ke ne malgrandan parton de la indiĝenoj la eŭropanoj disvendis kiel sklavojn. En la fino de la XVI-a jarcento jam estis tute malaperintaj la insularaj enlandanoj kvankam ne per plena ekstermo, sed danke multe al kunmikso kaj asimilo; ĉar multaj eŭropanoj patrinigis indiĝeninojn, kaj ties idojn oni ne plu rigardis kiel purindiĝenojn. Ĉi tiuj, siavice kunmiksiĝadis kun la eŭropanoj, ĉar hispanoj kaj portugaloj—la pleja parto de la envenintoj—ja neniam malemis sin kunigi al iuj ajn homoj de ajna mondparto. Eble al tio kontribuis, komence, ke la kanarianoj estis blankuloj kun blondaj haroj, altkreskaj kaj klarmensaj.

Ĉiu insulo de la arĥipelago havas siajn proprajn rimarkindajn ecojn. La plej elstara el la insularo tamen estas La Palmo (loklingve nomata



Tipa pejzaĝo

La Palma). Pri ĉi tiu traktas la sekvanta priskribo.


Kiel ĉiuj ĝiaj fratoj, La Palmo estas insulo de vulkana origino t.e., ĝi formiĝis per akumulado de vulkanaj elsputaĵoj, kiuj aglomeriĝis sur la plata marfundo. Tial ĉiu kanaria insulo estas aparta formacio, kvazaŭ eta kontinento, aŭtonoma firmtero. Inter ĉiuj insuloj sekve estas tre profundaj markoloj; la insuloj do ne rilatas unu al la alia el geologia vidpunkto.

Nu, kiel dirite, La Palmo estas la plej tipe elstara insulo de la arĥipelago. Unue direndas, ke ĝin konsistigas du malsamaj partoj. Ĉe la nordo, ĝi estas nur la flankoj de giganta pravulkana konuso. Jes, ja, giganta, ĉar La Palmo posedas la plej grandan krateron de la mondo. La periferio de tiu kratero mezuras 28.000 metrojn; la diametro estas 9.000 m. kaj ĝi havas profundon de 707 m. Ĝi okupas dekunuonon de la tuta insula surfaco. La interno de tiu konuso konsistigas unu el la plej ŝanĝiĝantaj kaj admirindaj pejzaĝoj de la insularo,

kiu ja ĉie estas admirinda. Jen oni vidas krudajn apikaĵojn, sen verda vivo; jen oni trovas prapinarojn, erikejojn, laŭrarojn, fagarojn; jen oni vidas elflui tre freŝan, abundegan puran akvon, kiu iras fekundigi apudmarajn plantejojn de bananoj, tomatoj, sukerkanoj; jen oni trovas domojn kaj kultivitajn kamparojn, brutarojn kaj fruktarbojn—ĉar en la interno de la kratero, tiom vasta ĝi estas, loĝas kelkdek familioj kun ĉiuj siaj viviloj; jen oni trovas sovaĝajn kaprojn, kiuj altiras la netimemajn ĉasistojn. Tie la pelĉaso estas tre riska kaj danĝera sporto!

La supraj bordoj de tiu kratero altas meze 2370 m. super la marnivelo. Tial ke la surfaco de la insulo ampleksas nur 726 kvadratajn kilometrojn, tio faras tiun landon la plej alta en la mondo, rilate al ĝia surfaco, kaj donas al la eksteraj flankoj de la kratero tre grandan klinon. Sur tiuj eksteraj deklivoj kuŝas la vilaĝoj kaj komunumoj de la insulo, meze inter la maro kaj la montarsupro, ĉar la marbordoj ne estas sufiĉe produktivaj sen akvumo, kaj la sub-suprojn kronas ĉiam-verdaj praarbaroj. La plej altaj pintoj estas tute kalvaj.

La suda parto de la insulo ne estas, kiel la norda, postrestaĵo de pravulkano. Kontraŭe, ĝi havas ankoraŭ tre aktivan vulkanaron. Post la eŭropa konkero fine de la XV-a jarcento, tiu insulo konis kvin vulkanojn, kiuj postlasis siajn okul-



Vulkano ankoraŭ minaca


frapajn paŝosignojn sur ĝia dorso. La lasta el tiuj vulkanoj ekaktivis en junio 1949 kaj ankoraŭ daŭras, eĉ se nun jam tre malforte. Vulkanoj ĉiam estas grandiozaj eventoj. Milionojn kaj milionojn da tunoj de fandita bazalto ili eligas kaj sternas ĉiutage sur la insulkamparojn. Eĉ la geografian profilon de la lando ili ŝanĝas, ĉar la eruptoj plenigas ravinojn, kavigas aliajn, surtavoligas vilaĝojn, faras novajn marbordajn terpintojn k.t.p. Kaj jen, al scienca intereso vulkana, la insulo aldonas aliajn interesojn. Ĝia temperaturo somere ne iras super 25° C.; vintre ĝi ne iras sub 14° C. Ĉi tiuj du ekstremoj kompreneble ĉe la marbordo, ĉar sur la plej altajn montpintojn kaj la internajn flankojn de la mezinsula prakraterego ĉiuvintr falas neĝo, kiu blanke ĉapelas la insulon. Eblas kurludi sur neĝo kaj sin bani en la maro dum la sama tago, kun agrabla sento ĉe ambaŭ faroj.

La vegetaĵaro ne estas malpli interesa. Tipaj specioj, kiaj la kanariaj laŭro, pino, palmo, violo, kaj la draceno (*Dracaena Draco*) *Apollonia Canariensis*, *Persea Indica*, k.t.p. kuniĝas kun kultivitaj arboj, kiuj ampleksas de ekvatoraj ĝis nordaj tipoj. Apud ananaso kaj banano troviĝas merizo kaj pomo. Ĉefaj kultivoj estas tiuj de migdaloj, tabako, tomatoj, tritiko, hordeo, sekalo, cepoj, sukerkano, vito, mespiloj, ananasoj, figoj, persikoj, piroj,

prunoj, kafo k.t.p. La iam importitaj agavo kaj nopalo* nun fremdece spicas la pejzaĝon. Troviĝas ankaŭ interesaj bestetoj, inter ili tipa grakulo, nur de La Palmo, kun beko kaj piedo tute ruĝaj kaj korpo tute nigra. Tipaj merloj kaj, kompreneble, sovaĝaj kanarioj kaj aliaj birdetoj ĉarmas la aeran mondon. Dangeraĵoj aŭ venenaj bestoj estas tute nekonataj de la insulanoj; lupoj, serpentoj, vipuroj, k.t.p. apartenas al la regno de la literaturo

Sur la industria kampo, fabrikado de cigaroj kaj cigaredoj tre famigis la insulon en la arĥipelago kaj eĉ ekster ĝi, en la hispanaj merkatoj. Teksaĵoj el natura silko, kiujn oni faras per tre primitivaj iloj kaj sistemoj, estas tre ŝatataj. Manbrodaĵojn oni eksportas grandkvante, precipe al Ameriko. Koĉenilo kaj melaso, iamaj tre gravaj produktaĵoj, hodiaŭ retroiras pro la ĥemiaj farboj kaj la amerikaj sukerfarejoj

* **nopalo** vegetaĵo amerikdevena *Nopalea coccinellifera* kun tre bongustaj fruktoj.



Vidaĵo post la erupcio

Interpopola mondparlamento

Raporto de D-ro Edmond Privat

LA tutmonda kongreso por mondparlamento (elektota de popoloj kaj sidonta kiel dua ĉambro apud kunveno de registaroj en UN) kunigis en Ĝenevo ĉirkaŭ kvincent diversnaciajn parlamentanojn, senatanojn, verkistojn, juristojn kaj pionorojn de mondfederalismo.

Kiel kongresan prezidanton ĝi elektis Prof. D-ron E. Privat, aŭtoron de konataj verkoj pri mondfederalismo, kaj honoran prezidanton de la svisa unuiĝo de propacaj asocioj. En la vicoj de la kunveno sidis kvardeko da parlamentanoj, inter ili impona grupo de japanaj senatanoj kaj intelektuloj, inter ili S-ro Deguĉi, estro de la Oomoto-movado.

En la malfermo Prof. Privat klarigis la celon de la kongreso en franca, angla kaj esperanta lingvoj, kaj oni faris ovacion al la unuaj delegitoj

laŭleĝe elektitaj (de la usona ŝtato Tennessee) S-ro Fyke Farmer kaj Senatano Marwell, ankaŭ al afrika profesoro Eyo Ita elektita de kelkaj distriktoj en Nigerio.

Esperante parolis S-ro Tadros Megalli (Egiptujo) kaj S-ro Popper (Israelo). Dum la diskutoj la angla estis la plej uzata lingvo. Tiuj, kiuj komprenis Esperanton reprezentis proks. trionon - kvaronon de la aŭdantaro. Pluraj parolantoj plendis pri la tempo perdita pro tradukoj anglan, francan, germanan kaj italan, kaj la Prezidanto permesis diskuton pri rekomendoj rilate al uzo de Esperanto en venonta kongreso. Tiu nuresperanta diskuto daŭris 18 minutojn en ĉeesto de la tuta kongreso. Parolis S-ro Isbrucker, S-ro Cseh, S-ro Wright kaj aliaj. La venonta kunveno kredeble okazos en Parizo dum la proksima septembro.

Kanaria Insularo (*daŭrigo*)

respektive ; tamen ili estas ankoraŭaj atestaĵoj de iam florintaj industrioj.

Jen iom supraĵa, tre rapida bildigo de La Palma, hejmlando de la aŭtoro. Apud idiliaj pejzaĝoj, kun ĉiamverdaj arbarmanteloj, jen vulkanaj vakejoj, kun bazaltaj kaj sablaj dezertoj ; apud neĝo sur plej altaj montpintoj, jen sun- kaj akvo-banoj ĉe la marbordo ; apud paŝtistaj moroj de kampuloj, kun kapraj kaj ŝafaj gregoj, jen ŝoseoj kun bruo de aŭtoj kaj benzinodoro ; apud tradiciemo, amo al folkloro, propra kulturo kaj pramoraro, jen ekleviĝas svingoj de

ĵusaj fremdodancoj, kantoj de sonfilmoj, sociaj skuiĝoj, proletara ribelemo . . . Kontrasto, ŝanĝiĝemo, diverso, ĉio en la unueca kadro de insulo ; jen mia lando, mia natura, geografie, etose mirinda kaj admirinda lando ! Aminda, malgraŭ ĝiaj 70.000 loĝantoj, kiuj kvazaŭ vete pellaboras al kalvigo de ĝiaj montoj, kaj al vulgarigo, platigo, prozigo de ĝia aspekto, pensante nur al la nuna materia profito. Kvankam la Naturo ja ĉion spitas, tamen la Poezio retiriĝas antaŭ la invado de la vulgaro, kiu jam grandpaŝe galopas sur la iamaj Feliĉaj Insuloj . . .

Pastro R. Edis Fairbairn :

En Kanado

VIVADO urbega estas sama preskaŭ ĉie en la mondo. Do se vi loĝas en Londono, Parizo, Novjorko, vi jam scias kiel oni vivas en Toronto, Vancouver, Montreal—sufiĉe da avantaĝoj, sed tro da personoj nekonataj kaj nekoneblaj, ĉirkaŭpremantaj vin ĉiufланke.

Kanado estas tiel vasta, ke neniu povas intime koni kondiĉojn en ĉiuj provincoj. Mi do skribu nur pri provinco Ontario, kaj el tio precipe pri malgrandurba kaj kampara socio.

Noveveninto tuj notus diferencon rilate aliajn landojn : se oni loĝas en komunumo havanta malpli ol kvinmil personojn, oni mem devas iri al la poŝtoŝicejo por ricevi poŝtaĵojn. Se tamen oni loĝas en vilaĝo oni iradas unufoje en ĉiu tago al butikoj, kiu servas ankaŭ kiel poŝtoŝicejo ; supozeble oni iras por havi leterojn, sed ankaŭ kaj ĉefe por renkonti konatojn kaj interŝanĝi novaĵojn kaj opiniojn. Se oni loĝas kampare oni havas poŝtskatolon muntitan per turnilo sur fosto vojflanka tiel, ke la poŝtisto povas enigi leterojn sen bezono eliĝi el veturilo.

En la lastaj ok jaroj de mia aktiva deĵorado kiel pastro, mi loĝis en tia komunumo. Mia hejmo estis en vilaĝeto Windermere en lagdistrikto Muskoka (tra tuta Kanado oni renkontas lokajn nomojn de konataj urboj kaj lokoj anglaj kaj eŭropaj. Granda industria urbego en suda Ontario portis la nomon *Berlin*, ĝis en la unua mondmilito oni ĝin ŝanĝis al *Kitchener*. Personaj nomoj kompreneble restis plejparte germanaj). Windermere estas domar-

eto de ĉirkaŭ 25 familioj de *tutjaruloj* ; sed posedas propran somerdomon ĉe lagbordo aŭ sur insuloj multaj kanadanoj el la urbegoj kaj kelkaj usonanoj. En Julio ĉi tiuj forflugas el urbegoj feriante. Samtempe plenigas hotelojn svarmo da vizitantoj. Vilaĝanoj ilin bonvenigas ĉar per turismo ili perlaboras siajn vivrimedojn. Tamen kiam en Septembro la lasta turisto piedpremas la ekilon kaj turnas sian aŭtomobilon suden, la hotelistoj kaj vilaĝanoj, flirtigante la manon adiaŭe, ankaŭ spiretas liberiĝe. De nun, dum almenaŭ naŭ monatoj, ili vivos sian propran vivon kaj la vilaĝo estos ilia propra.

Rapide forirante, la turistoj kredeble diras, ke Muskoka dum feriaj monatoj estas ĝuebla, sed terurega ŝajnas al ili la penso pri dumjara loĝado en vilaĝeto kia Windermere. Ili tute eraras. Estas bele vivi tutjare en malgrandaj komunumoj, sed aparte en Muskoka. Eĉ vintre estas pli komforte. La temperaturo malofte falas sub 40 gradojn subnulan ; 20 subnule estas pli ofta, sed sen vento estas tute tolerebla. Ial en Muskoka la neĝventoj ne estas tiel fortaj, kiel ĉe 100 mejloj pli sude kaj sekve neĝamasoj ne estas tiel profundaj.

En Anglujo kaj Eŭropo oni poezias la printempon. En Kanado tiu estas sezono de koto kaj oni ne facile poezias pri koto. Frosto eniras profunden laрузajn kamparajn vojojn kaj degelas nur malrapide. Kiam jam degelas, estas ĝene por aŭtomobilistoj. Alproksimiĝinte al ŝajne solida loko, oni trovas, ke ĝi

fakte havas densecon de avenkaĉo kaj la radoj subiĝas ĝis la aŭtomobilo restas firme sur la tero. Nenio helpas, krom ĉevalparo por tiri ĝin denove al surveturebla tero.

Aŭtuno — kiun en Kanado oni nomas *La Falo* (de la folioj)—estas la plej bela sezono. Kiu konas Muskoka nur en somero, tiu tute ne konas ĝian belecon. Post la unuaj nokto-frostoj okazas mirakla pejzaĝa ŝanĝiĝo. Betuloj flaviĝas, kverkoj bruniĝas kaj la aceroj surmetas robojn skarlatajn kaj karmezinajn. Tiujn helkolorojn akcentas la kontrasto je malhelverdoj de la pinoj kaj abioj. Respegulite en la lagakvo, tiu kolorskemo duobliĝas. En la tuta mondo nepre ne povas vidiĝi sceno pli kortuŝe belega. Mia preferata loko estis en Granita Valo, kie roka

krutaĵo frontas la lagon. Ofte mi—malpoeziemulo—haltigis la veturilon kaj sidis silente rigardante ĝis la okuloj pleniĝis je senhontaj larmoj.

Multloke en Ontario mi aŭdis saman diron: “antaŭ eble 40 jaroj loĝis ĉi tie duoble pli da personoj ol nun.” Ekzemple en Muskoka mi fotografis pejzaĝon ĉe rivero Deebank, malaltan akvofalon ĉe la elfluejo de Trimejla Lago. Ĝi aspektas kiel natura pejzaĝo netuŝita de homa mano ĝis tempo glacieja; sed kiam mi montris ĝin al amiko li ridis kaj diris, “Antaŭ kvindek jaroj la sola vojo en ĉi tiu distrikto transiris tiun akvofalon per ponto. Flanke staris hotelo, trietaĝa muelejo kaj forĝejo. Nun restas nenia postsigno.”

(La fronta bildo estas ksilogravuro de la aŭtoro).

PINOKJO

de C. Collodi

Tradukis Mirza Marchesi
Ilustris W. H. Matthews

150 paĝoj, bele presitaj

Bind. 5 ŝil., aŭfranko 6p.
Broŝ. 2ŝ. 6p., aŭfranko 4p.

Ne restas multaj ekzempleroj; mendu vian antaŭ ol ĉi tiu fama libro elĉerpiĝos.

Eldonita de

The Esperanto Publishing Co. Ltd.


Mendu ĉe

Universala Esperanto-Asocio

Heronsgate, Rickmansworth, Anglujo



Pinokjo kun azenaj oreloj



Vivo Virina

Gvidantino de ĉi tiu rubriko estas :

S-ino R. M. Dhonau, Avondale, Cromer Road, SHERINGHAM, Norfolk, Anglujo, al kiu oni adresu ĉiujn korespondaĵojn pri *Vivo Virina*.

Alergio : Multaj virinoj nuntempe plendas, ke specifa lipruĝumo aŭ pudro estas malbona ĉar post uzo la lipoj ŝvelas aŭ erupcio aperas sur la vizaĝo. Tiuj virinoj ofte kulpigas la firmon, kiu fabrikis la koncernan varon. Ili tamen probable malpravas. La varoj tre verŝajne estis puraj. La grandaj entreprenoj ne riskas sian reputacion, vendante malbonajn aĵojn. La ingrediencoj mem ne difektas, sed la reakcio de la uzanto. Tio estas speco de psikologia malsano, kies nomo estas alergia. Oni estas alergia, kiam kontakto kun specifa substanco produktas simptomojn, kiuj ne produktiĝas ĉe normalaj personoj en la samaj cirkonstancoj. Tiuj, kiuj ne povas manĝi ekz-e fragojn, konkulojn k.s. estas alergiaj. La substancoj pri kiuj personoj povas esti alergiaj, estas tre diversaj. Oni eĉ konstatis alergiajn pri katoj, kokinplumoj, ciroj, tinkturoj k.t.p. Se, do, vi kredas, ke iu preparaĵo estas malutila, ne koleru kontraŭ la fabrikistoj, sed vizitu specialiston pri haŭtmalsanoj. Li eble povos sanigi vin per injekto aŭ ia kuracilo (ekz-e vitaminoj), aŭ donos konsilon pri la preparaĵoj, kiujn vi povos uzi sen malutilo.

Ekspozicio pri Infana Bonfarto : En Parizo dum lastaj monatoj okazis granda ekspozicio pri la infano. Dek ok landoj elmontris siajn klopodojn pri la bonfarto de infanoj.

Oni forgesis nenion — nutradon, vestadon, edukon, amuzon. Estas certe, ke se ni ne ekstermos nin per atombomboj, la infanoj de la estonteco ĝuos vere bonan vivon !

Batalo kontraŭ kokluso : Kokluso estas grava infanmalsano, aparte por la infanoj malpli ol dujaraĝaj. La kuracistoj daŭre klopodas eltrovi injekton, kiu protektos la infanon kontraŭ tiu malsano, simile kiel injekto imunigas pri difterio. En Anglujo la plej nova informo venas el Manchester, kie la Komitato por Publika Sano projektas inokuli 20.000 infanojn inter la aĝoj de ses monatoj kaj kvar jaroj. La Kuraca Esplor-Konsilo provizas kvanton da du vakcinoj, kiuj ŝajnas efikaj kontraŭ kokluso. Ĝi esperas ricevi reciproke informojn pri la rezulto. Ĉiu infano ricevos tri inokulojn kaj oni observos ĝin en la hejmo dum 2 jaroj.

Recepto de la monato—

Fromaĝa pasteĉo :

Interne kovru pasteĉpelvon per pastaĵo. Kuiru du aŭ tri lardotranĉojn kaj metu ilin sur la pastaĵon. Batu tri ovojn kaj miksu ilin kun taspleno da raspita fromaĝo kaj sufiĉe da kremo aŭ lakto por fari miksaĵon, kiu plenigas la pelvon ĝis la rando. Aldonu pecetojn da butero kaj kuiru 30 ĝis 40 minutojn. Oni povas manĝi la kuiraĵon aŭ malvarma aŭ varma.

Esperantista Vivo

Naskiĝoj

Heimann al D-ro kaj S-ino Walter, en Montevideo, Urugvajo filo nomita Miguel.

Ravetllat al Ges-roj J. en Perpignan, Francujo, filino Françoise Josephine.

Withoos al Ges-roj A. W., D. de U.E.A. en Eindhoven, Nederl. 30 nov. 1950 filino Henny.

Fianĉiĝo

Hachin-Albault : F-ino Helena Hachin kaj S-ro Andreo Albault en Toulouse, Francujo, 24 dec. 1950.

Geedziĝo

Berman, S-ro Oscar, Vicĉefdelegito de U.E.A. por Izraelo, 8 okt. 1950.

Harris-Rokkan : F-ino Elizabeth G. Harris en Llanbeds-Pont-Steffan, Kimrujo kun S-ro Georg St. Rokkan en Narvik, Norvegujo, 14 okt. 1950.

Al ĉiuj ni esprimas nian sinceran gratulon.

daŭrigo de p. 47.

anstataŭigas la $Rh +$ infanan sangon per sama kvanto de $Rh -$, sur kiun la $Rh --$ sango de la patrino ne havas detruan efikon.

En la praktiko la agadmaniere estas kompreneble multe pli komplika ol la ĉi supra klarigo povus kredigi.

Tiu esploro jam fariĝis preskaŭ rutina. Patro aŭ infano $Rh -$ estas sensignifa. Danĝero ekzistas nur se la patrino estas $Rh --$ kaj la patro $Rh +$. En tiu kazo la unua infano preskaŭ certe estos normala; la sekvontojn oni povos savi dank' al *macacus rhesus*, kelkaj unikloj kaj la homa genio. Tio jam okazis por miloj da infanoj.

(La aŭtoro deziras esprimi dankon al D-ro P. Kempeneers pro afabla kontrolo de la manuskripto kaj al S-ro B. Long pro utila konsilo lingva).

Niaj mortintoj

Ni eksciis pri la forpaso de la jenaj samideanoj al kies parencoj ni volas esprimi nian profundan kondolencon.—Red.

Beau, S-ro Benoit, D. de U.E.A. en Macon, Francujo, 80-jara. Malavara subtenanto de U.E.A. kaj de la movado dum multaj jaroj.

Bugge, S-ro M., Honora membro de la Klubo Esperantista en Oslo, 94-jara. Nestoro de la Esperantistoj en Norvegujo.

Christaller Prof. P. G. 31 dec. 1950 91-jara en Stuttgart, Germ. Nekrologo sekvos en marta numero.

Ferdinand, S-ro R., D. de U.E.A. 13 dec. 1950 en Bégles, Francujo. Agema kaj sindona samideano.

Little, S-ro H. en Oldham, Brit. Detaloj mankas. Agema samideano en sia loko.

Mann, S-ro J. W. en Leeds, Anglujo, 30 dec. 82-jara. Membro de la loka societo dum 44 jaroj.

Moore, S-ro E. en Bolton, Anglujo, 5 nov. 1950.

Oishi, D-ro Wasaburo, 18 dec. 1950, 75-jara en Japanujo. Ĉefdirektoro de J.E.I. de 1930 ĝis 1945. Li instalas Aerologian Observatorion en Tateno 1920, de kiam li estis direktoro de la observatorio ĝis 1945. Dank' al lia klopodo la jarraportoj de la Observatorio aperis nur en Esperanto entute 19 volumoj, 23×30cm. 150–300 p. por volumo). Li komencis lerni Esperanton kiam li iris al Germanujo laŭ la ordono de la registaro por preparo de la instalo de la observatorio kaj estis instigita de D-ro A. Schmidt, dir. de la astronomia observatorio en Potsdam.

Ramstedt, Prof G. J. en Finnlando 25 nov. 1950, 77-jara. Pioniro de Esperanto en sia lando. Fama finna filologo.

Seok, S-ro D. M., D. de U.E.A. en Seoul, Koreo, fino de sept. 1950. Kvankam nur mezaĝa li jam havis grandan famon kiel sciencisto kaj uzis tiun famon por nia afero. Instruis Esperanton en universitato korea. Aldone al sciencaj verkoj li verkis multajn artikolojn pri sia fako ofte kun resumoj en Esperanto. La Nacia Scienca Muzeo, kie li laboris, estas detruita per bombo, kaj konjekteble ankaŭ li mortis samtempe.

A. C. Blatt.

M. Otiel :



Savado de Infanoj

Lastatempaj malkovroj en kirurgio alportas novan esperon al gepatroj

GIS 1940 trispecaj tragedioj minacis gepatrojn dezirantajn infanon : aborto, mortnaskiĝo, kaj baldaŭ postnaskiĝa morto. Tiu lasta estis fenomeno kiu longatempe estis mistero por la kuracistoj. Ofte okazis, ke post naskiĝo de tute sana infano kiu vivis, naskiĝis infanoj mortnaskitaj, aŭ kiuj baldaŭ estis trafitaj de speco de iktero grade pligraviganta ĝis la infano mortis post kelkaj tagoj. Nur en Britujo 3000 patrinoj ĉiujare suferis tiun teruran kordoloron kaj neniu kuracisto povis doni esperigan konsilon pri eventuala kuracmaniero.

La vojo al la solvo de tiu problemo eliras el la Serologia Laboratorio de la Fakestro por Publika Sano en Nov-Jorko, kaj el la Transfuzo Fakto de la juda hospitalo en Brooklyn, ambaŭ en Usono.

Du kuracistoj, D-roj Landsteiner kaj Wiener, eksperimentis per injekto de hematioj (ruĝaj sangoglobuletoj) de simioj en vejnojn de kunikloj. Sero de tiuj kunikloj, miksitaj kun homa sango, donis neatenditajn reakciojn. Tiu reakcio tamen ne montriĝis kun sango de ĉiu homo ; tio pruvis, ke iu specifa faktoro troviĝas en la sango de kelkaj homoj sed ne de aliaj. Tiun faktoron la aŭtoroj nomis *reza faktoro*, ĉar la uzita sango devenas de *reza simio* (*macacus rhesus*).* Mallonge, ĝi estas

* Tiu reza simio troviĝas grandnombre en Hindujo. La loĝantoj montras altan respekton al tiuj bestoj, kiuj vivas precipe en la ĉirkaŭaĵo de temploj.

skribita *Rh*. Esploroj montris, ke 85% de la homoj estas *Rh +* (pozitivaj) kaj 15% estas *Rh -* (negativaj).

Tiu fakto estas tre gravaj ; D-ro Levine esploris la sangon de la patrinoj kies dua kaj sekvantaj infanoj mortis, kaj tiun de la patroj ; ĉiuj tiuj virinoj estis *Rh -*, dum la patroj estis *Rh +* !


El tio rezultas la stranga okazaĵo ; la unua infano estas normala, sed dum la gravedeco la patrina sango fariĝas reakciema al la patra sango, kaj estas kapabla detrui la hematiojn de la dua infano dum la graveda periodo, je pli aŭ malpli alta grado. El tio rezultas ĉu aborto, ĉu mortnaskiĝo, ĉu baldaŭ mortonta vivanta infano, kun iktero.

Oni kontrolis tiujn faktojn tra la tuta mondo kaj la esploro konfirmis la rezultojn akiritajn en Usono. Kuracistoj kontrolis la sangon de la gravedaj virinoj por trovi la virinojn *Rh -*, kiuj estas emaj naski ne-normale.

Rimedo estas relative simpla.

La akuŝon oni okazigas antaŭtempe, ĉar la hemolizo de la hematioj okazas plejparte dum la lastaj semajnoj de la gravedeco. Poste oni transfuzas al la infano sangon de la ĝusta tipo. La sango de la infano estas *Rh +* (veninta de la patro) ; ĝi estas hemolizata de la patrina sango (*Rh -*). Trans la sangovazo de la umbilika ŝnuro oni iom post iom

daŭrigo sur p. 46



Tra la Libraro

Duope ricevitaĵn verkojn ni recenzas ;
unuope ricevas nur mencion.

*=akireblaj ĉe U.E.A.

***Retoriko** de Prof. D-ro Ivo Lapenna : eld. la aŭtoro ; 18.5 × 13.5 cm. 215 p. broŝ. prezo 10ŝil. plus 6p. afranko.

Jen libro, kies enhavo estas pli ampleksa ol la titolo. Same kiel ĉiu metiisto devas ĝisfunde koni sian ilaron, la aŭtoro opinias, ke oratoro devas koni sian ilon, kiu estas la lingvo. Tial li dediĉis la unuan trionon de tiu libro—kaj parton de la resto—al “La Lingvo”. Plie, ĉar li verkis por esperantistoj, li neniam forgesis ekzameni la problemojn el la vidpunkto de la Internacia Lingvo.

La prilingva parto sin turnas al la tuta esperantista publiko. Ĉar multaj samideanoj emas diskuti pri lingvaj aferoj, ili trovos tie ĉi abundan rikolton. La aŭtoro pristudas formiĝon kaj evoluon de la lingvoj, kaj celas montri, ke nia Internacia Lingvo estos la lasta unika ĉenero en kiu estos sorbiĝintaj la sennomaj parolitaj kaj parolataj lingvoj. En la ĉapitro “De multlingveco kaj alilingveco” li alproprigas al la konkludon de la rusa lingvisto Marr : “La lingvoj moviĝadis kaj nun moviĝas al ĉiam malpli granda nombro da lingvoj, kio finfine devos doni al la estonta unueca homaro ĝian unuecan komunan lingvon.”

Efektive la aŭtoro adoptas la materialisman teorion de tiu sciencisto pri formiĝo de la lingvoj. Oni scias, kiom multaj sciencistoj diskutis pri tiu temo kaj akceptis plej diversajn teoriojn. Laŭ Marr, la unua homa lingvo tute ne estis sona, sed mana,

signa, “kinematika”. La prahomo, tamen, havis kapablon eligi kelkajn sonojn, kiuj estis *sal, ber, jon* kaj *ros*, el la gorĝo. Iom post iom tiuj elementaj sonkompleksoj, unue nekonsciaj reagoj sen aparta signifo, fariĝis signoj, kaj la unua asociiĝo okazis inter la sono kaj la objekto aŭ fenomeno. Marr, kiu estis ankaŭ etnologo, montras kiel, samtempe, modifiĝis la lango kaj la mentono de la antropoida simio por fariĝi nia praulo.

La aŭtoro mem prave rimarkas, ke multaj punktoj de tiu teorio ne povas esti akceptataj ; sed ne estas tie ĉi loko por diskuti. Oni tamen komprenas, ke laŭ tiu teorio ekzistis tiom da pralingvoj, kiom da homgrupoj sur la tero.

Unu el la plej interesaj ĉapitroj montras la faktorojn, kiuj influas la lingvojn, aŭ kiel diferencigaj (geografiaj, kastaj aŭ klasaj, seksaj, religiaj) aŭ kiel unuecigaj (divido de la laboro, priegalecaj ideoj, teknikaj kaj klerigaj faktoroj).

La dua, pli longa parto, de la libro koncernas la retorikon, aŭ, pli ĝenerale, la parolarton. Tie oni trovas detalplenajn ĉapitrojn pri la fizikaj, intelektaj, moralaj ecoj de la oratoro, pri lia sinteno al la diversaj publikoj, pri la specoj de paroladoj ; multaj el tiuj detaloj interesos eĉ tiujn, kiuj ne pretendas fariĝi oratoroj. Fine, aldono entenas kvar ekzemplojn de paroladoj, kun komentoj.

Multaj samideanoj konas la oratoran talenton de D-ro Lapenna,

kaj kun altnivela plezuro retrovos tie lian fluan, elegantan stilon. La temo trudis neologismojn (ekz. retorikajn figurojn). Kaj la deziro esprimi facile nuancojn de vortoj trovatajn en diversaj lingvoj incitis la aŭtoron al nuancigoj, kiuj okazigos diskutojn. Speciale, li postulas por la literaturo rajton formi verbojn el adjektivoj. Ekz. li diras “la neĝo estas blanka” (konstato de fakto); sed en montaro kovrita de neĝo, li diras “la neĝo blankas” (t.e. impresas blanke). Oni komparu kun “utili” (esti utila) kaj kun “ne gravas” (ne estas grava), ofte uzataj. Oni vidos ankaŭ sisteman uzadon de “certa” en senco de “iu”, kaj de “sufiĉe” en senco de “ne mal-”; ekz. “certaj sufiĉe fortaj medioj” en senco de “iuj ne malfortaj sociaj medioj”.

Tiu verko estas do fonto de multaj diskutindaj temoj; pri kelkaj el ili la leganto povos havi alian opinion; sed ili ne lasos lin indiferenta kaj kondukos lin al memdiskuto de siaj opinioj.

La libro prezentigas bele. El la preseraroj mi devas citi unu gravan, kiun certe rimarkos la Francoj. La fama metaforo “la ĉaro de la ŝtato navigacias sur vulkano” ne apartenas al Proudhon, serioza sociologo, sed al Joseph Prudhomme, karikatura tipo kreita de Henri Monnier, kiu metas en lian buŝon groteskajn frazojn.

L. Bastien, Akademiano.

***Kiso de la reĝino** de I. F. Naĵivin, el la rusa lingvo trad. de D. Staritsky; eld. The Esperanto Publishing Co. Ltd.; 18.5×11cm. 188 p. karton., prezo 3ŝ. 9p. afranko 3p.

La 10-a volumo el la Epoko-serio ne estas klasikaĵo, sed ĝi bone

daŭrigas la vicon de la distraj kaj amuzaj legaĵoj.

La aŭtoro kondukas nin en la Belgan Kongon kaj partoprenigas nin en la aventuroj de rusa inĝeniero, kiu post la unua mondmilito konstruas fervojon en la nigra kontinento. Amo al ĉarma blankulino, la edzino de ĉefo de la fervoja kompanio, ekkaptas lin, kaj samtempe nigra belulino, la potenca kaj varmegsanga reĝino de negra gento, enamiĝas al li. Fatala situacio, kiu kreas multajn komplikaĵojn.

Nu, oni ja konjektas la finon, sed la aŭtoro, verkisto de multnombraj romanoj, ĉiam denove scias streĉi la atenton de la leganto per aventuroj kun la indiĝenoj kaj sovaĝegaj bestoj, per stepbrulego, inundo de formikoj, intrigoj inter afrikanoj kaj eŭropanoj. Kiel en opereto li metas apud seriozan paron, bonhumoran kaj multajn aliajn personojn, blankajn kaj nigrajn, kiuj evidentigas, ke ĉie en la mondo la homoj ĝojas kaj ĉagreniĝas, amas kaj malamas, esperas kaj malesperas. Kelkan admonan vorton la aŭtoro direktas al la eŭropanoj, kiuj ofte trofieras kaj ne ĉiam scias ekkoni la homon en la nigraj gefratoj.

La tradukon mi ne povas kompari kun la originalo, ĉar mi ne konas la rusan lingvon. La vortsekvo en kelkaj frazoj estas (laŭ mia opinio) nemodela kaj iufoje malhelpas la tujan komprenon. Ĉi tiu strangaĵo, kiel ekz-e ankaŭ la frazo “La kanotoj rapide *sin portis* sur la fluo de rivero” havas, laŭ informo de samideano, kiu scipovas la rusan, sian kaŭzon en la lingvo de la originalo. Ofte min frapis la unuvortaj verbformoj “sinokupis”, “sinĵetis”, kaj similaj, kiuj al mi ne ŝajnas necesaj, nek imitindaj.

Tamen entute, *Kiso de la reĝino* estas rekomendinda legaĵo, kiun vi ne forgesu enpoŝigi por longa, teda trajnvojaĝo.

E. Dahlmann, Berlin.

Korekto : Pro la ŝanĝo je formato en la januara n-ro, estis nepre necese foruzi kelke da jam kompostita materialo antaŭ la jarfino. Tial iuj artikoloj kaj kontribuaĵoj devis esti mallongigitaj. En la recenzo de M.S. pri *Interlingvistiko kaj Esperantologio* de D-ro W. Manders, ekstraktoj estis farataj, kiuj iom ŝanĝis la sencon, kion ni ne rimarkis en la momento. Juste kaj al D-ro Manders kaj al M.S. ni volas citi la tekstojn ekstraktitajn. Post “ sed atribuas tion al aliaj faktoroj ” legu (nova alineo) :

D-ro Manders iom detale analizas kaj kritikas la starpunkton de la “naturalistoj” kun aparta atento al la pretendoj de E. de Wahl. Tiu lasta estis inter tiuj, kiuj en la fruaj tagoj de Esperanto instigis D-ron Zamenhof enkonduki radikalajn reformojn por igi la lingvon pli naturaspekta. Lia aserto ” k.t.p.

Antaŭ la lasta alineo staris :

“D-ro Manders, malgraŭ sia defendo de la principoj de Zamenhof, inklinas admiri la kvalitojn de iuj aliaj lingvoprojektoj, kies efektiva valoro fakte estas nur teoria, aŭ specialist.”

Tiuj citaĵoj espereble igos kongruaj la komentojn de M.S. kaj la cetere favoran konkludon pri la verko entute.—Redakcio.

***La nuna stato de l'evoluismo :** Jean Rostand ; trad. J. kaj M. Delacourt. Eld. S.A.T. 20×13cm. 114 p. kartonita 6 ŝil. tole bind. 7 ŝil. afranko 4p.

En kvin ĉapitroj la aŭtoro sisteme kaj klare evoluigas la “evoluismon” t.e. la estiĝo de la nunaj formoj de

vivantaj estaĵoj sur nia tero. Hodiaŭ la evoluismo jam ne estas “demando” aŭ “problemo”. La principon oni ĝenerale akceptas kaj la diskutado turnas sin nur pri la procedo de la evoluo. La ĉefaj teorioj pri tio estas ligitaj kun la nomoj de tri tre malsamaj viroj : Lamarque, Darwin kaj Mendel. La jena verko nun donas sinsekve ĉiujn elementojn de tiu ĉi scienca branĉo : Pruvoj pri la evoluisma teorio, la origino de la vivo, la lamarkismo, la darvinismo, la ŝanĝiĝismo, la origino de la homo.

Ne estas nia tasko eniri en detalojn de la verko mem. La stilo estas klara, facile legebla, kun agrabla literaro, kaj bona prezento. Se mi jam devas fari rimarkon, temas pri la vorto “ŝanĝiĝismo”. Se oni jam akceptas ĝenerale vortojn kiel “lamarkismo” kaj “darvinismo”, kial do ne ankaŭ “mendelismo” ?

Laŭdinda estas la kompletigo de la verko per listo de sciencaj vortoj plejparte grek-latinaj en Esperanta formo. Oni devas danki al S.A.T. ke ĝi kompletigis sian jam riĉan liston de valoraj verkoj per ankoraŭ unu bonvena riĉigo de nia scienca literaturo.

H.J.

Kongreslibro, XXII-a Kongreso de Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista, 10–17 aŭg. 1950, Sankta Jaro, Roma, Italujo. . 80 p. 17×12cm. ilustrita.

Enhavas ĝeneralajn informojn pri tiu ĉi kongreso, diversajn preĝojn kaj himnojn, krome liston de la 300 aliĝintoj al la kongreso kaj liston laŭloke aranĝitan de italaj Esperantistoj.

H.J.

“INTERNACIA MONDLITERATURO”

Ĉiuj volumoj estas denove haveblaj.

1. **Hermano kaj Doroteo.** Goethe. El la germana trad. B. Küster.
2. **Legendoj.** Niemojewski. El la pola trad. Bronislaw Kuhl.
3. **Elektitaj Noveloj.** Turgenev. El la rusa trad. A. Mexin.
4. **La Nigra Galero.** Raabe. El la germana trad. F. Wicke.
5. **El la “Camera Obscura”.** Hildebrand. El la ned. trad. H. C. Mees.
6. **El la Skizlibro.** Irving. El la angla trad. H. L. Elvin.
7. **La mirinda historio de Petro Schlemihl.** Chamisso. El la germana trad. Eugen Wüster.
8. **Nuntempaj Rakontoj.** Stamatov. El la bulgara trad. I. H. Krestanoff.
9. **Hebreaj Rakontoj.** Ŝalom-Aleĥem. El la hebrea trad. I. Muĉnik.
10. **Tri Noveloj.** Puŝkin. El la rusa trad. A. Fiŝer.
- 11–12. **Deklaracio.** Ariŝima. El la japana trad. T. Tooguu.
(Duobla numero ; duobla prezo.)
13. **Ses Noveloj.** Poe. El la angla trad. A. F. Milward.
14. **La firmao de la kato, kiu pilkludas.** Balzac. El la franca trad. P. Benoit.
15. **Orientaj Fabeloj.** Doroŝeviĉ. El la rusa trad. A. Hohlov.
16. **Noveloj.** Sienkiewicz. El la pola trad. Lidja Zamenhof.
17. **Insulo de Feliĉuloj.** Strindberg. El la sveda trad. O. Frode.
18. **Barbaraj Prozaĵoj.** Prudenci. El la kataluna trad. J. G. Casas.
19. **Ano de l’Ringludo.** Ŝimunoviĉ. El la kroata trad. F. Janjiĉ.
20. **Servokapabla ! Marcus Tybout.** Eekhoud. El la franca trad. L. Bergiers.
21. **Nobela Peko.** Sadoveanu. El la rumana trad. T. Morariu.

Prezo por unu numero 1ŝil. 9p., afranko 2p.

(aŭ 6 respondkuponoj, afrankite.)

Mendu ĉe

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo

Enigma Konkurso N-ro 55

Solvojn oni sendu al S-ro P. H. Mooy,
20-A Avenue Molière, Brussel-Forest,
Belgujo.

**Solvoj de la enigmoj en konkurso
N-ro 53.**



N-ro 115: abrikoto, akacio, anemono,
astero, ĉerizo, dalio, datur, diano,
edelvejso, eriko, fazeolo, frago, frambo,
galanto, gladiolo, hiacinto, hortensio,
jasmeno, kafo, kamelio, kakto, kaŝtano,
konvalo, kratago, krizantemo, krokuso,
lamio, laŭro, lekanto, lilio, lotuso,
merizo, mirto, moruso, narciso,
nikotiano, nimfeo, oleandro, orkideo,
persiko, petroselo, piro, pizo, pomo,
pruno, rafano, rubuso, sambuko,
siringo, trifolio.

N-ro 116: Leono estas besto.
Ŝlosilvortoj: tamBUR-L-ESKapi,
pepSIN-E-DRIado, ezoFAG-O-CITizo,
makLER-N-ANTeno, musKAT-O-
LIKeno, treMOL-E-KULiso, diaKON-
S-TRUnko, indeKS-T-ERMeno,
konKAV-A-LIRiko, balKON-S-
PIRato, malLUM-B-RIKano, delFEN-
E-STRigo, hetMAN-S-ARDezo,
poleKS-T-REMizo, perSIK-O-
MORGaŭ.

N-ro 117: Ekzemple: Kolero
pravecon ne donas. kolibro - omaro -
leono - elefanto - rano - ostro - pantero -
rinocero - azeno - vulpo - ezoko -
cikonio - ortopteroj - najtingalo -
narvalo - eglefino - dromedaro -
orangutango - noktuo - angilo - struto.

Gajnis la premiojn post kontrolo de la
51-a konkurso: S-ro T. K. Slade (Brit.)
154 p., S-ro A. E. Rosengard-Hansen
(Dan.) 145 p., S-ro M. Cornet (Ned.)
141 p.

Enigmo N-ro 120: Sesangula enigmo.
Ĉiu el la ses fakoj ĉirkaŭ numerita
sesanguleto devas enhavi unu literon.
Tiuj ses literoj formas vorton. Ĉe la
klarigo de ĉiu vorto troviĝas inter-
krampe du literoj. La unua indikas
(laŭ la apude presita sesanguleto) la
fakon en kiu komenciĝas la koncerna
vorto; la dua indikas la lokon de la
dua litero de tiu vorto. La signifoj
de la 19 vortoj estas:—1. folio de



florkaliko (FE); 2. gasa nubo (BA); 3.
karakterizas mokaŭ dirmanieron (EF); 4.
birdeto (FA); 5. kajo (BA); 6. punkto de la
ĉiela sfero (FE); 7. floro (FA); 8. kalia
hidroksido (BC); 9. politika reĝimo uzanta
kruelecon (FE); 10. literatura verko (FE);
11. Dipatrino (FA); 12. internacia mezurunuo
(BA); 13. senkolora gaso (DC); 14. senfenestra
ĉambro (DE); 15. meblo (FA); 16. mantelo
kun kapuĉo (FE); 17. malpuriga loko sur io
(BC); 18. ridiga (BC); 19. bedaŭrindaĵo (BA).
Ensendis S-ro J. Escaré (Francujo).

Enigmo N-ro 121: Sesangula enigmo: (Sama
figuro kiel por N-ro 120): 1. aro da belaj (AB);
2. pilkoĵetilo (CB); 3. nazego (ED); 4. mal-
agrabla impresio (CD); 5. akcesoraĵo (AB);
6. malpliigo de prezo (CD); 7. ebenigo de ligno
(AF); 8. simio (AF); 9. medikamento (EF);
10. mistika hebrea doktrino (ED); 11. parolema
(AB); 12. zigzage navigi (AB); 13. franca stilo
de meblaro (ED); 14. tipografia signo (CD);
15. kvalifikas idon de eŭropaj gepatroj, naskitan
en kolonio (AF); 16. meteoro (EF); 17. kiel el
densa materio (BC); 18. ebena tegmento kun
balustrado (DC); 19. glavoportilo (CD).
Ensendis S-ro J. Escaré.

Fred Parker :

Socia Sekureco en Britujo

ANTAŭ 350 jaroj la angla parlamento akceptis akton kiu fariĝis la unua *Poor Law* (Leĝo por malriĉuloj). Ĝi celis la helpon al la mizeraj malriĉuloj per impostoj, kiujn devis pagi laŭ sia kapablo ĉiuj personoj en la regno. Tiu leĝo estis la bazo de ĉiuj sociaj servoj en la historio de Britujo. Tamen dum ĉirkaŭ 300 jaroj okazis apenaŭ ia ŝanĝo en la administrado aŭ koncepto de tiu leĝo. La mizeruloj restis, plejparte, mizeraj. Charles Dickens en sia majstra verko *Oliver Twist* ŝokis la publikan konsciencon, kiam li bildigis la kondiĉojn, kiuj karakterizis la administradon de la *Poor Law* en la unuaj jardekoj de la pasinta jarcento. Sed ne ĝis la jaro 1909 venis la unua el la sociaj reformoj ligitaj kun la nomo Lloyd George. Tio estis la Pensio por Maljunuloj per kiu ĉiu persono je la aĝo de 70 jaroj, kies enspezo ne sumiĝis je pli ol 21 pundoj en jaro, rajtis ricevi po 5 ŝilingoj ĉiusemajne.

Ĝi vekis grandan intereson pri aliaj projektoj por reciproka helpo, sed per asekurado. La Brita popolo preferis ĝin tiel; oni preferis pagi por la eventualaj avantaĝoj, kaj sur la bazo de komuna devo oni alkiutimiĝis al la ideo de socia asekuro. Baldaŭ prezentigis la *National Health Insurance Scheme* (Nacia Asekuro por la Sano) per kiu, kontraŭ pago de kelkpenca imposto ĉiusemajne oni povis ricevi kuracadon, medikamenton kaj enspezojn dum periodoj de malsano. Poste venis *Unemployment Insurance* (Asekuro kontraŭ Senlaboro) kiu en la jaro 1938 jam efikis por 15 milionoj da laboristoj. En 1925 venis Pensioj por Vidvinoj kaj

Orfoj. Tamen restis ankoraŭ multaj familioj kiujn la diversaj leĝoj ne tuŝis. Tro da homoj estis elbaritaj el asekurado; tro da familiaj bezonoj ne estis kovritaj. Oni lasis tro multe al la fako de Publika Helpo.

En la fruaj jaroj de la lasta mondmilito la Brita registaro nomis komisionon, kiu esploru la interrilatojn de la jam ekzistantaj projektoj pri socia asekuro kaj similaj servoj. Ĝia tasko estis, plene trastudi la aferon kaj fari rekomendojn. Tio estis la Komitato Beveridge kaj ĝia raporto eldoniĝis je la fino de 1942. La nuna sistemo de socia asekuro estas la rezulto de la laboro de tiu komitato. Je julio 5-a 1948 la tuta projekto de Socia Asekuro efektiviĝis. La laŭleĝaj stadioj estis jene:

Family Allowances Act (Akto pri familiaj subvencioj) 1945.

Industrial Injuries Act (Akto pri asekuro kontraŭ akcidentoj en industrio) julio, 1946.

Old Age Pensions (Pensioj por maljunuloj) aŭgusto 1946.

National Assistance (Ŝtata helpo) majo 1948.

La rezulto de tiuj leĝoj, kune kun la *National Health Service Act* (Akto pri ŝtata servo por la sano) de 1946 kaj la *Children's Act* (Akto pri infanoj) 1948 estis, ke ĉiuj Britoj ricevas asekuron *de la lulilo ĝis la tombo*.

Socia Sekureco signifas sekurecon por la tuta familio kontraŭ la financa premo de respondecoj, kaj la urĝecoj kaj hazardoj de la familia vivo, kiel ekzemple, malsano, akcidento en la laborejo, senlaboro, maljuneco kaj morto. *Family Allowances* (familiaj

subvencioj) donas po 5 ŝilingoj por ĉiu infano (kun escepto de la unua) ĝis la aĝo de 15 jaroj. Nuntempe 3 milionoj da familioj ricevas por 4 milionoj da infanoj subvencion de 60 milionoj da pundoj ĉiujare. Antaŭ-kaj post-naskiĝa prizorgo, san-servado, familia subvencio, special-raĵtaj nutraĵoj kaj lakto senpaga garantias bonan komencon por ĉiuj infanoj sur la vojo de la vivo. Laŭ la *Children's Act* infanoj, kiuj ne ĝuas normalan hejmvivadon povas esti lokataj en hejmojn, kie kromgepatroj prizorgas ilin. En la lernejoj lakto por la infanoj estas senpaga. Ses milionoj da infanoj ĝuas tiun benon.

National Health Service, kiu estas tute aparta de la Ŝtata Asekuro, ricevas siajn rimedojn el la impostoj naciaj kaj urbaj. Ĉiuj rajtas utiligi ĝiajn servojn, ĉu pagante al la asekura kaso aŭ ne. Partoprenas la servojn **ankaŭ vizitantoj al Britujo**. La projekto ampleksas ĉiajn fakojn de la kuracista arto kaj inkluzivas kuracad-on en kaj ekster hospitaloj, kirurgion, medikamentojn, okulvitrojn, dentojn, aŭdilojn por la surdaj, kuracon en hospitaloj por la mense nesanaĵoj k.s. La patrino nun ne hezitas alvoki la kuraciston pro timo al eventuala kosto. La hospitaloj ne plu dependas de hazardaj monsubtenoj. Ĉiu persono en la lando rajtas partopreni en la servoj sen plua pago. Se dum laboro okazas akcidento, kiu necesigas restadon en hospitalo, la paciento ricevas rekompencan jone:

fraŭl(in)o: 45 ŝilingojn dum 26 semajnoj

edzo: 61 ŝilingojn dum 26 semajnoj
edzo kun 1 infano: 68½ ŝilingojn dum 26 semajnoj

Se li tute difektiĝas tiel ke li ne plu povas labori, li ricevas ĉiusemajne 45

ĝis 88½ ŝilingojn laŭ siaj dependantoj. Kriplulo tute senpovigita tiel ke li ne povas sin movi per la kruroj, povas ricevi aŭtoĉaran speciale konstruitan, kun subvencio de 45 pundoj jare por teni ĝin en bona ordo. Entute, kion ajn oni bezonas por konservi la sanon aŭ por la kuraco de malsano estas havebla por ĉiuj en la lando.

Ŝtata Asekuro: en ĉi tiu projekto estas tri sekcioj:

(a) la dungito, (b) personoj kiuj havas propran entreprenon, (c) tiu, kiu ne havas ian pagatan laboron. La asekuratoj pagas jene: Sekcio (a) La dunginto pagas: por viro 4ŝ. 2p.; por virino 3ŝ. 3p.; por knabo 2ŝ. 5½p.; por knabino 1ŝ. 11p.

La dungito pagas: viro 4ŝ. 11p.; virino 3ŝ. 10p.; knabo 2ŝ. 10½p.; knabino 2ŝ. 4p.

Kontraŭ tiuj pagoj la dungitoj rajtas ricevi asekure jene:

Dum malsano aŭ senlaboro: viro sen dependantoj 26ŝ.; virino 26ŝ.; viro kun edzino kaj infano 49ŝ. 6p.

Pro maljuneco: fraŭl(in)o: 26ŝ.
geedzoj: 42ŝ.

Pro patrineco virinoj ricevas po 36ŝ. dum 13 semajnoj post la nasko.

Pro vidvineco virinoj ricevas 36ŝ. daŭre (kun 1 infano 42 ŝ.).

En sekcio (b) viro pagas 6ŝ. 2p.; virino 5ŝ. 1p.

En sekcio (c) viro pagas 4ŝ. 8p.; virino 3ŝ. 8p.

En ĉiuj sekcioj la asekuro estas la sama por ĉiuj pagantoj.

Spaco mankas por ĉiuj ciferoj pri pagoj kaj avantaĝoj. Restas nur citi la mezan salajron ĉiusemajnan de laboristoj ĉiuspecaj en Britujo. Por viroj ĝi estas £6-5-0 kaj por virinoj £4-18-6 (do respektive 125ŝ. kaj 98½ŝ.)



Por via distro

Sendu vian plej amuzan anekdoton al M. Otiel, ĉe U.E.A., Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo. Antaŭdankon

La parlamento

Kion signifas centro, dekstro, maldekstro?

La centre sidantaj jam havas ian ordenon; la dekstre sidantaj tre deziras havi ordenon, kaj la maldekstre sidantaj neniam ricevos ordenon, tial ili faras al la registaro plejeble multe da malhelpo. La tuton oni nomas konstitucio.

Optimo

Kia aplombo! Komizo vi estas, kaj vi aŭdacas peti la manon de mia filino!

Sed, kompreneble, sinjoro, mi volonte mian oficon tuj rezignus!

Filozofio

Mi estas tute mizera kaj malfeliĉa. Sen mono oni povas fari nenion.

Ne prava vi estas amiko. Sen mono oni povas fari ŝuldojn!

Fraŭlinoj estas tiom praktikaj!

“Karulino, mi vin amegas. Kredu min, brulas en mi granda flamo neestingebla”

“Bone, bone. Ni rapidu hejmen por kuiri miajn ovojn. La gaso ne funkcias dum du tagoj.”

Inter gefianĉoj

Ŝi: Pri kio vi nunmomente pensas, mia kara?

Li: Ĝuste pri tio, kion ankaŭ vi nunmomente pensas, mia karulino.

Ŝi (ruĝigante): Ho, vi maldeca senhontulo!

Kio estas via V.-K.?

(Respondoj sur p. 61)

Kompilas S-ro A. S. Beuker, Bijenhofstr. 34, Leeuwarden, Nederlando.

Divenu la ĝustajn en la signifoj ĉe la sekvantaj vortoj. Se vi ĝuste elektas ĉiujn, via Vort-Kvocianto estas 100. Tamen deprenu 10 por ĉiu miselekto aŭ nescio.

1. Cigano : (a) speco de cigaro, (b) kirloventego, (c) homo el vaganta gento?

2. Fakiro : (a) legomo, (b) ĵonglisto, (c) hinda asketo?

3. Stabo : (a) tablo por metia laboro, (b) bovejo, (c) aro da superaj oficiroj?

4. Konvekso : (a) malkava, (b) kvadrata, (c) celtaŭga?

5. Rabeno : (a) hebrea pastro, (b) diskonto, (c) birdo?

6. Mosko : (a) tre odora substanco, (b) delikata vegetaĵo, (c) islama preĝejo?

7. Lavango : (a) falanta neĝamaso, (b) substanco uzata en parfumoj, (c) pluvtorento?

8. Galono : (a) mezurunuo por fluido, (b) ornama rubando, (c) punlaborejo?

9. Futo : (a) parto de suba membro de homo, (b) mezuro de longo, (c) negrava afero?

10. Homogena : (a) havanta saman naturon, (b) homsimila, (c) interrilata?



ESPERANTO KAJ RADIO

Mallongigoj :

I=Informoj, P=Parolado, K=Kurso

Dimanĉo	16.00–16.20	Roma. 19.5m., 31.1m. P. Radio Roma—Esperanto, Via Vittorio Veneto 56.
Lundo	05.30–05.35	Wien. 513m., 25m., 30m., 41m., 48m. I. Radio Wien, Argentinierstr. 30a, Wien IV.
	07.15–07.30	Stockholm. 19.80m., 49.46m. P.
	07.45–08.00	Lille. 235m. P. Radiodiffusion Française, Lille (Nord), Francujo.
	14.30–15.00	Rio de Janeiro. 375m., 30.71m. K. I. Radio Ministério da Educação e Saude, Rio de Janeiro, (DF) Brazilo.
	15.15–15.30	Stockholm. 19.80m., 27.83m. P. Sveriges Radio, Stockholm 7, Svedlando.
	22.15–22.20	Hilversum. 402m. I. (ĉiun duan lundon). V.A.R.A. Heuvellaan 33, Hilversum, Nederlando.
Mardo	01.15–01.30	Stockholm. 19.80m., 27.83m. P.
	11.55–12.00	Bern. 48.66m., 31.46m., 13.94m. P. D-ro Baur. SRG, Kurzwelldienst, Neuengasse 28, Bern.
	17.35–17.40	Bern. Kiel je 11.50, sed anst. 13.94m., sur 19.60m.
	23.30–23.45	Gvatemalo. 49m. I. La Voz de Centro América. Guatemala Cd., C. Ameriko.
Ĵaŭdo	08.30–08.45	Paris. 347m., 48.39m. K.
	11.55–12.00	Bern. Kiel marde. D-ro Privat.
	17.10–17.25	Wien. 203m., 25m., 30m., 41m., 48m. P. (ĉiun duan ĵaŭdon).
	17.35–17.40	Bern. Kiel marde. D-ro Privat.
Vendredo	16.00–16.20	Roma. Kiel dimanĉe.
Sabato	20.00–20.15	Sofia. 39.11m. P. Radio Sofia, Bulgarujo.
	22.15–22.20	Hilversum. 298m. P. K.R.O., Emmastraat 52, Hilversum, Nederlando.

Klarigo—En la tabelo la horoj de la dissendoj estas laŭ la horsistemo de Greenwich. Por Mez-Eŭropa tempo oni aldonu unu horon.

Stacio K.R.O., Hilversum, Ned., volas scii, ĉu aŭskultantoj pli bone ricevas laŭ ondolongo 298m. aŭ 402m. Ĝi elsendos laŭ 298m. ĝis aprilo; de aprilo ĝis julio laŭ 402m. Nepre sciigu la instancojn !

Ĉiujn informojn pri radio sendu al S-ro G. Larglantier, 29 Bd. Murat, PARIS 16, Francujo.

Ankoraŭ informojn pri radio vidu sub *Tra la Mondo Esperantista*.

Nia felietono :

La Alaska Stafeto

F. Omelka

II. Ĝemantaj dratoj

DOKTORO WELCH rapidis tra la senhomaj stratoj al la poŝtoŝtacio. La senkompata frosto penetris ankaŭ sub lian dikan peltmantelon, sed la kuracisto malatentis tion. Li ja eĉ ne sentis ĝin. Ĉiuj liaj pensoj estis fiksitaĵoj al la unusola : havigi la seron kaj transportigi ĝin kiel eble plej baldaŭ al Nome.

Fine li atingis la poŝtoŝtacion. Li frapegis la masivajn fenestrokovrilojn kaj aŭskultis. Momenton nenio moviĝis. Sed poste knaris la ŝtuparo, ŝlosilo grincis kaj la oficisto iom malfermis la pordon.

“Halo, kiu estas ?” li ekvokis en la mallumon.

“Welch,” sonis la konciza respondo.

“Ho, jen vi, sinjoro doktoro ! Bonvolu eniri, ĉar la vento estas kapabla forporti la homon.”

“Sinjoro Smith, mi devas forsendi ekspres-telegramon al Seattle,” diris la kuracisto.

“Tre simpla afero, sinjoro doktoro !”

La kuracisto eniris la oficejon kaj sidiĝis sur la seĝon. La poŝtoŝtaciisto preparis al si kraĵonon kaj paperon.

“Nu—ni povas komenci !”

Kaj doktoro Welch diktis :

“Al bakteriologia instituto en Seattle. Nome, la 25-an de januaro. Difteri-epidemia, ni ne posedas freŝan seron. Sendu tuj. Doktoro Welch.”

La oficisto apenaŭ finskribis, kiam li demandis timigite :

“Ĉu en nia urbo estas difterio ?”

“Bedaŭrinde.”

“Kiom da pacientoj ?”

“Ĝis nun kvar. Sed mi timas, ke ili estos pli multaj.”

“Tio estas malbona. Tre malbona. Ĉar alporti la seron el Seattle en tiu ĉi sezono—tio ja estus vera miraklo.”

“Mi scias. Sed se la infanoj devas vivi, tiu ĉi miraklo devas okazi.”

Sinjoro Smith sidiĝis al la telegraf-aparato kaj frapetis per ŝlosilo ŝajne sensignifajn, sed vere tiom gravajn streketojn kaj punktojn.

“Ĝi progresos rapide. Ĉiuj linioj estas malokupitaj,” li diris post forsendo de la telegramo.

“Mi dankas vin. Se la respondo venos ankoraŭ nun dum la nokto,

sendu ĝin per iu, mi petas, al mia domo. Se venos nenio, matene mi vizitos vin.”

“Restu momenton por varmiĝi ĉe mi, sinjoro doktoro !”

“Dankon ! Mi estas maltrankvila. Kiu scias, se ne atendas min hejme denove iu malfeliĉa patrino.”

Doktoro Welch revenis hejmen. Sinjorino Welch atendis lin.

“Ĉu vi sukcesis ?” ŝi demandis tuj en la pordo.

“Jes. La telegramo estas jam forsendita. Nur ke en Seattle oni agu rapide. Sed kedu al mi—,” li volis ankoraŭ ion aldoni, sed subite li eksilentis kaj mediteme rigardis al la estingiĝanta fajreto en la forno.

“Ĉu vi volis ion diri ?” ekrigardis lin sinjorino Welch kaj ŝia kunsenta rigardo atestis, ke ŝi travivas kun sia edzo ĉiujn dubojn, luktojn kaj esperojn.

“Jes efektive ĝi ja estas malfacila afero, Silvio ! Kiel ajn mi pripensas tion, mi tamen ne povas imagi al mi, ke ili estos kapablaj alveturigi la seron alimaniere ol per aeroplano. Kaj mi dubas, ĉu aeroplano kuraĝus ĉi tien nun, en la frostoj, kiajn ni jam longan tempon ne travivis.”

Sinjorino Welch ne respondis. Ankaŭ ŝi konkludis la samon, sed tamen ŝi ne povis kaj ne volis kredi, ke la infanoj de Nome devos en la venontaj tagoj morti sen helpo.

La geedzoj Welch ne povis pro turmentaj pensoj eĉ dormi. Ili ambaŭ meditis kaj ĉe ĉiu brueto mildigis la spiradon, por ke ili aŭdu eventualan frapadon de iu patrino aŭ de la sendito el la poŝtoŭicejo.

Fine antaŭ la tagiĝo aŭdiĝis energia frapado je la pordo. Doktoro Welch saltis el la lito kaj rapidis malfermi.

“Jen la telegramo, sinjoro,” donis al li folieton maljuna Jim.

“Mi dankas vin, Jim,” diris la kuracisto kaj iris kun la telegramo en la dormoĉambron.

“Ĉu nova paciento ?” demandis sinjorino Welch.

“Ne. Telegramo el Seattle.”

“Jam ? Legu, mi petas vin !”

“Al doktoro welch nome punkto seattle la dukdeksesan de januaro punkto ni forsendis la seron per aeroplano al anchorage punkto pluen la aeroplano ne povas riski pro la veteraj malhelpaĵoj punkto la pluan alporton aranĝu mem punkto doktoro jenkins.”

Anchorage—Nome !

Nur ĉi tiuj vortoj traflugis la pensojn de la kuracisto, kiam li finlegis la telegramon. Du mallongaj vortoj, sed kio kuŝas efektive inter ili ! Kiom da glaciaj ebenaĵoj, neĝmontoj kaj perfidaj abismoj ! Kiom da ventegoj kaj frostoj ! Kiom da senkonsola polusa mallumo, kaj kiom da sporadaj, grizaj radioj de taglumo !

Sed la alvoko estis konciza kaj klara. La pluan alporton aranĝu mem !

Neniu demandas, kiaj transport-ebloj ekzistas en tiu ĉi dezerta lando. Kaj ĉu mirinde? Kiu ja devas ĉi tie koni ĉion pli bone ol li, doktoro Welch, kiu vivas en Alasko pli ol dudek jarojn? Jes, doktoro Jenkins pravas. Seattle-Anchorage, tio estis lia devo. Sed Anchorage-Nome, tio estas afero de doktoro Welch.

La zorg-elĉerpita kuracisto malrapide rektiĝis. Subite li sentis, kvazaŭ li liberigus sin de ĉiu laciĝo, senpovo kaj timo antaŭ la fantomo de la epidemio. Li apartenis al tiuj homoj, kiuj ne evitas respondecon. Kiuj ĝojas, se antaŭ ilin estas starigitaj tiaj taskoj, kiaj ŝajnas al la plimulto de la homoj nevenkeblaj. Li estis unu el tiuj, kiuj trovas la sencon de la vivo en la plenumo de siaj devoj.

Rapide decidiĝinte, li foriris al la poŝtoŭficejo.

“Bonan tagon, sinjoro Smith! Do—vi jam scias”

“Jes, sinjoro doktoro. Sed kion ni faru nun?”

“Ĉu mi povas fari telefonan komunikon al Anchorage?”

“Espereble. Almenaŭ post noktomezo mi estis sciigita, ke ĉiuj linioj estas nedifektitaj.”

“Bonege! Kontaktigu min kun la stacidoma oficejo!”

La alvoko al la stacidoma oficejo en Anchorage flugis per zumantaj dratoj tra la dezertaj tundroj, frostiĝintaj riveroj kaj vastaj praarbaroj pli rapide ol la plej sovaĝa uragano.

Post nelonge ili estis en kontakto.

Doktoro Welch prenis aŭdilon.

“Tie ĉi Nome, doktoro Welch. Kiu estas ĉe la aparato?”

“Staciestro de Anchorage.”

“Sinjoro staciestro, hodiaŭ estos al vi transdonata la sero—”

“El Seattle por Nome, jes, mi scias pri la afero,” interrompis lin la staciestro. “Ni atendas ĝin antaŭ la vespero.”

“Ĉu funkcias fervoja servo al Nenana?”

“Ĝis nun jes. Sur kelkaj lokoj estiĝis ja iom grandaj neĝamasoj, sed oni denove sukcesis liberigi la fervojon.”

“Bone! Post ricevo de la sero forsendu ĝin per la plej proksima vagonaro al Nenana!”

“Mi aranĝos tion, sinjoro doktoro! Cetere—restu momenton ĉe la aparato, mi parolos kun nia lokomotivejo.”

“Mi atendas.”

Doktoro Welch tenis la aŭdilon. Post nelonge aŭdiĝis la staciestro denove.

“Halo—ĉu vi estas ĉe la aparato?”

“Jes.”

“Sinjoro doktoro, la seron ni forsendos al Nenana per ekstra lokomotivo.”

“Bonege, sinjoro ! Mi dankas vin !”

“Kaj kiamaniere vi alveturigis ĝin el Nenana ?”

Doktoro Welch embarasite eksilentis. Se li sciis tion !

Pli frue ol li povis respondi, enkuris en la poŝtoŝtationon ploranta virino. Si estis Eskimino.

“Sinjoro doktoro, mi petas vin, venu tuj al ni ! Nia Kudlago estas malsana, li estas tiom varmega, li malfacile spiras—”

“Atendu, patrino, tuj mi estos preta,” li diris al ŝi. Kaj klinite al la telefon-aparato, li vokis :

“Halo ! ?”

“Jes !”

“Komuniku al Nenana, ke la pluan alveturigon de la sero aranĝos mi mem ! Ili atendu miajn instrukciojn !”

“Jes, mi sciigos ilin. Persistu !”

“Dankon !”

Doktoro Welch pendigis la aŭdilon, adiaŭis al Smith kaj iris kun la Eskimino en ŝian loĝejon. Ĝi estis kompatinda kabanaĉo, konstruita el miksaĵo de ligno, argilo, musko kaj ŝtonaro. En la angulo sur la ligna kuŝbreto, kovrita per senharigitaj feloj, kuŝis dekjara knabo. Li eruptis konfuzajn, nekompreneblajn kriojn. Sur lia frunto ŝvito perlis.

La kuracisto eksciis tuj ĉe la unua rigardo, ke li venas malfrue.

“Kiam li ekmalsaniĝis ?” li demandis la malfeliĉan patrinon, kiu ne ĉesis korŝire plendi.

“Antaŭ du tagoj,” ŝi singultis.

“Jam antaŭ tri,” aŭdiĝis murmura voĉo el alia angulo de la malforte prilumita ĉambro.

Doktoro Welch rigardis tien. Nur nun li ekrimarkis, ke tie kuŝas amaseto da feloj, en ĝi ia amaso da grasaĵo, ostoj kaj malpureco, kiu kune reprezentis la malafablan kapon de la eskima familio.

“Kaj kial vi ne alvokis min pli frue ?”

“Kiu ja pensus, ke la malsano povas esti tiom malbona ! Ho, sinjoro doktoro, savu lin !” per ploranta voĉo petegis la virino.

“Ĝi aspektas tre serioza. Sed eble ni sukcesos savi lin,” diris la kuracisto. Per siaj vortoj li volis nur konsoli kaj plifortigi. Li sciis, ke ĉi tie ĉio estas jam senespera.

El la eskima kabano li iris rekte al la ŝerifo.

Post nelonge la tuta urbo sciis, kio okazis. Estis malpermesite amase kunveni. Ankaŭ hoteloj estis fermataj, ĉar epidemio ne limiĝas nur je la infanoj. Dum la tago montriĝis, ke malsaniĝis ankaŭ kelkaj plenkreskaj personoj.

Doktoro Welch havis la manojn plenaj de laboro. Li mem jam ne sciis, en kiom da domoj li vizitis la malsanulojn. Kaj ĉiu injekto, kiun li donis, pikis lin pli multe ol la pacienton. Li ja konsciis, ke li povas nur malproksimigi la katastrofon, sed ke li ne povos ĝin haltigi por ĉiam.

En la malfrua posttagmezo li ricevis la sciigon, ke Kudlago mortis.

Kiam li fine vespere reiris al sia hejmo, li estis ĝismorte lacigita. Dum la tuta tago li ne manĝis eĉ unu manĝopeceton. Kaj la doloro de ĉiuj pacientoj koncentriĝis en lia animo. Li suferis kun ĉiuj kaj pro ĉiuj.

Antaŭ noktomezo iu ekfrapis je la pordo. Doktoro Welch iris malfermi. Sur la strato staris sendito el la poŝtoŝtelo. Li alportis telegrafan sciigon el Nenana :

“Al doktoro Welch, Nome. La fervojstacio Anchorage sciigis nin, ke ĝi forsendas la seron per ekstra lokomotivo. Sur la fervojo estas novaj neĝblovaĵoj, sed laboristoj jam forigas ilin. Tagmeze la sero povas esti en Nenana. Komuniku, kion pri ĝi !”

(daŭrigota)

Kio estas via V.-K. ?

(vidu p. 55)

Respondoj

1. (c) **Cigano** estas homo el vaganta gento.
2. (c) **Fakiro** estas hinda asketo.
3. (c) **Stabo** estas aro da superaj oficiroj.
4. (a) **Konvekso** signifas malkava.
5. (a) **Rabeno** estas hebrea pastro.
6. (a) **Mosko** estas tre odora substanco.
7. (a) **Lavango** estas falanta neĝamaso.
8. (b) **Galono** estas ornama rubando.
9. (b) **Futo** estas mezuro de longo.
10. (a) **Homogena** signifas havanta saman naturon.

Alvoko

Ĉiuj Esperantistaj organizaĵoj kaj unuopuloj estas petataj sciigi la adresojn de sialandaj parlamentanoj Esperantistoj. Koncernas ricevi superrigardon, en kiuj landoj jam estas parlamentanoj, kiuj parolas nian lingvon. Respondojn bonvolu direkti al Dietrich Keuning, parlamentano, Deutscher Bundestag, BONN, Germanujo. Dankon.

Internacia Koresponda Servo

La Peranto de I.K.S. (vidu decembran numeron 1950 de *Esperanto* kaj Jarlibron) sciigas, ke samideanoj en landoj, kie poŝtaj respondkuponoj ne estas haveblaj, povos sendi anstataŭ la 2 rpk. menciitaj, neuzitajn memorigajn aŭ bonfarajn poŝtmarkojn ĝis valoro de kvaroblo de afranko por eksterlandenira letero. Adreso : R. Melo, MEYLIEU par Montrond les Bains, (Loire), Francujo.

La Internacia Konkurso

LA suba tabelo montras la rezulton de la 1950-a konkurso. Al Hispanujo, kiu gajnis la konkurson per atingo de la duoblo de sia kvoto, ni sincere gratulas. Pro tiu bonega laboro de siaj membroj la Hispana Esperanto-Federacio ricevos premion £10, kaj ĉiu hispana delegito ricevos libropremion. Gratulon kaj dankon ankaŭ al Maroko, kiu faris mirindan progreson dum la jaro.

Lando	Kvoto	Poentoj	%
1. Hispanujo ..	600	1220	203.3
2. Maroko ..	250	435	174.0
3. Aŭstrujo ..	700	1112	158.8
4. Izraelo ..	250	320	128.0
5. Italujo ..	1450	1821	125.6
6. Germanujo ..	2000	2420	121.0
7. Urugvajo ..	250	290	116.0
8. Brazilo ..	2200	2536	115.3
9. Sud-Afriko ..	250	285	114.0
10. Finnlando ..	1800	2045	113.6
11. Svedlando ..	4900	5485	111.9
12. Francujo ..	5200	5795	111.4
13. Svislando ..	1300	1435	110.4
14. Aŭstralio ..	900	980	108.9
15. Belgujo ..	2000	2175	108.7
16. Norvegujo ..	1500	1477	98.5
17. Nederlando ..	5100	4991	97.9
18. Britujo ..	12500	11915	95.3
19. Kanado ..	250	235	94.0
20. Nov-Zelando ..	850	791	93.1
21. Danlando ..	3100	2860	92.3
22. Usono ..	3100	2855	92.1
23. Argentino ..	1000	805	80.5
24. Irlando ..	250	190	76.0
25. Islando ..	660	470	71.2
26. Hungarujo ..	1400	915	65.4
27. Egiptujo ..	250	105	42.0
28. Pollando ..	4650	1910	41.1

Estas interese konstati, ke duono de la landoj atingis sian kvoton, kaj tri-kvaronoj atingis 90%. En la landoj ĉe la fino de la tabelo ekzistis specialaj cirkonstancoj kiuj kaŭzis tion, tute ekster la dispono de la Esperantistoj.

La konkurso elvokis tiom da intereso, ke nia Estraro interkonsentis pri simila konkurso por 1951. La aljuĝo de poentoj estos kiel antaŭe—AM 1, MJ 5, MA 10, MS 15, Patrono 50, nova Dumviva Membro 50. La Landa Asocio en la lando kiu plej bone sukcesos ricevos £10 (122 sv. fr.) kaj ĉiu delegito en tiu lando ricevos libropremion. Jen la kvotoj por 1951:

Argentino ..	800	Izraelo ..	300
Aŭstralio ..	900	Japanujo ..	800
Aŭstrujo ..	1000	Kanado ..	250
Belgujo ..	2100	Kubo ..	250
Brazilo ..	2500	Maroko ..	400
Britujo ..	12000	Nederlando ..	5000
Danlando ..	2800	Norvegujo ..	1400
Finnlando ..	2000	Nov-Zelando ..	800
Francujo ..	5700	Portugalujo ..	600
Germanujo ..	2400	Sud-Afriko ..	250
Hispanujo ..	1100	Svedlando ..	5300
Irlando ..	250	Svislando ..	1400
Islando ..	500	Urugvajo ..	250
Italujo ..	1700	Usono ..	3000

Do, al la laboro! Ne forgesu, ke bona laboro en ĉiu lando ne nur helpas al UEA kaj al la enlanda movado, sed ankaŭ helpas al ni provizi por vi pli bonan kaj pli allogan gazeton.

T.J.O.

La 7-a Internacia Junular-Kunveno de T.J.O. okazos de 26 julio ĝis 2 aŭg. 1951 en la nederlanda urbo Haarlem. La urbestro tre favoras la aranĝojn kaj tre verŝajne eldonos Esperantlingvan faldfolion pri la vidindaĵoj de la urbo.

La adreso de la organiza komitato estas: M. Tinxgracht 10, EDAM, Nederlando.

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

Centra Oficejo : Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo.

OFICIALA INFORMILO

N-ro 234.

10-an Januaron 1951

STATISTIKO. Jen la stato de la membraro je la fino de 1950, kaj ankaŭ, por komparo, je la fino de 1949 :—

	1949	1950
Asociaj membroj	12822	8988
Individuaj		
membroj :		
MJ	863	886
MA	4429	4264
MS	365	288
Patronoj ..	17	15
DM	193	211
HM	60	59
	5927	5723
	18749	14711

La malkresko ŝuldiĝas al manko de informoj el kelkaj nepagokapablaj landoj.

Korespondaĵoj (sen la gazeto) traktitaj en la Centra Oficejo en 1950 :

Ricevitaj ..	10013	8342
Senditaj ..	19064	20588
	29077	28930

JARLIBRO. La jarlibro estas nun presata kaj espereble eliros en la komenco de Februaro. La jenaj informoj ne troviĝas en ĝi.

NOVA KOMITATANO

S-ro Mr. Fr. Höfert, Penzingerstr. 121, Wien XIV, Aŭstrujo.

DELEGITOJ

Belgujo

Eupen. D : Pastro R. Ernst, am Kloster 2. Tel : 1852.
FD (Religio) : La D.

Danlando

Vejle. FD (Instruado de idiotoj) : S-ino E. Nielsen, Ribe-Landevej 47. Tel : 3346.

Finnlando

Vampula. D : Viljo Eronen. Tel : 97.

Francujo

Marseille. D : vakas.

Hispanujo

Madrid. D : J. López Herrero, Conde Peñalver 52.

Irlando

Béal Átha an Fheadha (Ballina). D : L. O'Cuirc, F/ch Mac Gabhann, Ardán Maolthuile. Tel : 62.

Izraelo

Afikim. D : Bencion Danon, Kibuc Afikim. Tel : Kineret 12.

FD (Kolektivaj kolonioj) : La D.

Beer-Jaakov. FD (Vegetarismo) : J. Dorn, P.O.B. 2135, Tel-Aviv.

Jugoslavujo

Sarajevo. FD (Instruado teknika) : La D.

Nederlando

Aarle-Rixtel. D : J. A. J. Slaats, Dorpsstraat A 34 b. Tel K 4928-204.

Svedujo

Göteborg. FD (Maristaj aferoj) : G. A. Nygård, Väderkvarnsg. 17, Göteborg 8.

Höje. D : Lars Andersson. Tel : Råda 73.

NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

E. Carlén, Hällabrottet, Svedujo
J. Régulo Pérez, La Laguna, Kanarioj

PATRONOJ 1951

6. Ford, S-ro J. L., London, Anglujo
7. Grocott, S-ro J. R., Blackburn, Anglujo
8. Jervis, S-ro R. F., Slough Anglujo
9. Kennedy, S-ro D., Glasgow, Skotlando

MEMBRO-SUBTENANTOJ 1951

57. Bevan, S-ro G., Wrexham, Kimrujo
58. Boatman, S-ro D. P., Westcliff-on-Sea, Anglujo
59. Clarke, S-ro W., Dunfermline, Skotlando
60. Dunbar, S-ro R., London, Anglujo
61. Goulding, S-ro E. I., Woking, Anglujo
62. Jayne, S-ro E. K., Croydon, Anglujo
63. Larking, S-ro S. H., London, Anglujo
64. Macfarlane, F-ino A. G., Glasgow, Skotlando

65. Pearson, F-ino E. M., York, Anglujo
66. Prince, S-ro A., Letchworth, Anglujo
67. Phelan, S-ro H. K., London, Anglujo
68. Amelin, S-ino H., London, Anglujo
69. Eisele, S-ro J., St. Louis, Mo., Usono
70. Gerdman, S-ro B., Stockholm, Svedujo
71. Gustafsson, S-ro I., Grythyttan, Svedujo
72. Roelofs, S-ro J. J., Soest, Nederlando
73. Daly, F-ino E. de B., Okehampton, Anglujo
74. Edwards, S-ro G. D., London, Anglujo
75. Fortey, F-ino I. C., Leicester, Anglujo
76. Goldsmith, S-ro C. C., Rickmansworth, Anglujo
77. Hattersley, S-ro C. M., Mexborough, Anglujo
78. Kennedy, S-ro R., Glasgow, Skotlando
79. Sly, S-ro K. A., Slough, Anglujo
80. Vere, S-ino H. de, Wrotham, Anglujo
81. Collins, S-ro E., Hamilton, Ont., Kanado
82. Boscarino, S-ro A. G. S., Ragusa, Italujo
83. Maeland, S-ro O., Rjukan, Norvegujo.
84. Dodge, S-ro E. G., Washington, D.C., Usono
85. Karlson, S-ro R., Camden, N.J., Usono
86. Mitschke, S-ro F., Paterson, N.J., Usono
87. Vedder, S-ro F. W., Washington, D.C., Usono
88. Mathias, S-ro F. V., Sebaa Aioun, Maroko
89. Ohana, S-ro B. S., Marrakech, Maroko
90. Soyeur, S-ro J., Liège, Belgujo
91. Anderson, S-ro B. E. S., Danbury, Anglujo
92. Chinn, S-ro C. G., Welwyn Garden City, Anglujo
93. Endean, S-ro H. G., Woldingham, Anglujo
94. Glennie, F-ino C. M., London, Anglujo
95. Newland, S-ro R. A., Watford, Anglujo
96. Preedy, S-ro G. L., South Cerney, Anglujo
97. Rudman, S-ro F. C., London, Anglujo

98. Taylor, S-ro F. V., Albury, N.S.W., Aŭstralio
99. Ducommun, S-ro E., Les Brenets, Svislando
100. Veles Rojas, S-ro J. A., Bogota, Kolombio
101. Unchitti, S-ro C. L., Bangkok, Siamoj
102. Liebeck, D-ro S., Cape Town, Sudafriko
103. Rayner, S-ro R. W., Ruiru, Kenjo
104. Jelenc, S-ro F., Alger, Alĝerio
105. Beau, S-ro B., Mâcon, Francujo
106. Dedieu, F-ino J., Toulouse, Francujo
107. Perrier, S-ro M., Strasbourg, Francujo
108. Trésorier, S-ro J., Liesle, Francujo
109. Allen-Smith, S-ro H. W., Watford, Anglujo
110. Atkinson, S-ro W. G., Walton-on-Naze, Anglujo
111. Bean, D-ro C. M., London, Anglujo
112. Bridger, S-ro H. J., Bexleyheath, Anglujo
113. Cather, S-ro W. A., Torquay, Anglujo
114. Denton, S-ino M. T. D., London, Anglujo
115. Finbow, S-ro A. E., London, Anglujo
116. Guise, S-ro W. C., Rugby, Anglujo
117. Miskimmon, S-ro W. A., Hamilton, Skotlando
118. Ramsay, F-ino J. D., Kirkcaldy, Skotlando
119. Riding, F-ino E., Herne Bay, Anglujo
120. Worcester, S-ino D. M., London, Anglujo
121. Bloemendal, F-ino S. W., Lochem, Nederlando
122. van Delden, S-ro P., Deventer, Nederlando
123. Mabesoone, S-ro P. M., Amsterdam, Nederlando
124. Wehrheim, D-ro H., Hildesheim, Germanujo
125. Friess, S-ro H., Bensheim, Germanujo

DONACIOJ. T. J. Gueritte 60ŝ., J. W. Chambers 7ŝ. 6p., B. J. Broadway 10ŝ., J. C. Flugel 7ŝ. 6p., S-ino L. A. Evans 2ŝ. 3p., C. J. S. Kitching 20ŝ., F-ino H. Steel 2ŝ. 6p., H. Milsom 5ŝ., F-ino E. M. Robertson 5ŝ., F-ino E. McGarvie 5ŝ.

Sinceran dankon al ĉiu helpanto

C. C. GOLDSMITH, *Sekretario.*

ANONCETOJ

Kosto : du pencoj por ĉiu vorto, aŭ internacia respondkuponon por ĉiu duo da vortoj.

Ĉiu anoncanto morale devigas sin respondi minimume unu fojon al ĉiu kiu skribas.

Anonceto por iu numero devas atingi nin antaŭ la 6-a de la antaŭa monato.

Internacia Komerca Servo : Belga peranto : Konijnenperken 109, Bosvoorde, Belgujo.

AAAAAAAAAlt ! Legu Jarlibron pĝ. 55.

La Kvakera Mesaĝo pri la Krista lumo interna en la koroj de ĉiuj homoj ĉie ajn. Du libretoj haveblaj kontraŭ unu respondkuponon, ĉe G. B. Tordoff, 82 Pendennis Park, Bristol 4, Anglujo (Kvakera Esperantista Societo).

Mi deziras interŝanĝi kun la tuta mondo ilustr. pk. sen koverta. Ĉiam respondos. Jean Requillard, à la Croix Moreau, Vierzon (Cher), Francujo.

Feriu en Brighton ! Lito kun matenmanĝo 7ŝ. 6p., tri manĝoj 13ŝ. 6p., S-ino Batchelor, 8 Queen's Park Rise, Brighton, Anglujo.

18-jaraj studentinoj de instruista seminario deziras korespondi en Esperanto kun studentoj eksterlandaj. (1) Elisabeth Hackl, Maximilianstr. 43, Innsbruck (Tirolo), Aŭstrujo. (2) Erika Teicht, sama adreso.

Juna Aŭstralia lernanto interŝanĝos ilustritajn poŝtkartojn kun ĉiuj Esperantistoj. Billy Jansen, 22 Queen St., Cooks Hill, Newcastle, N.S.W., Aŭstralio.

Edzino de Newcastle Esperantisto deziras korespondi kun aliaj sinjorinoj de la mondo pri virinaj aferoj, kaj il. pk. kaj pm. Alice Perry, 123 Ingall St., Mayfield, Newcastle, N.S.W., Aŭstralio.

Kontakto serĉata kun ŝipkonstrua inĝeniero, kiu ekster fako posedas kreaĵojn fantazion, intereson al aventuro kaj literaturo. Vilho Setälä, Onnentie 23, Helsinko, Finnlando.

Seminarianoj (estontaj popollernejaj instruistoj) deziras korespondi per L. kaj I.P. Respondo garantiata. Esperanto-Grupo, Seminario, Kajaani, Finnlando.

Ĉiulandaj gejunuloj (kaj kelkaj plenaĝuloj) estas ree invitataj pasigi 3-4 semajnojn senpage en esperantaj hejmoj somere 1951. Joel Vilkki, Somero, Finnlando.

20 gekursanoj korespondos tutmonde. S-ro Thiollet, 26 place Grégoire-Bordillon, Angers, Francujo.

Esperanto-Societo Hannover. Nia novembra varbekspozicio estis tre sukcesplena. Koran dankon al ĉiuj, kiuj sendis salutkartojn k.t.p. (Alvenis 116 el 23 landoj). Nun ni preparas por Julio 1951 ekspozicion de infandesegnaĵoj kaj aliaj objektoj eksterlandaj. Se eble ni rekompencos laŭ valoro kaj deziro. Bonvolu helpi kaj sendi materialon per adreso : Horst Michling, Steinbergstr. 1, Hannover-Kirchrode. Germanujo.

S-ro José Marquez, Str. Miquel Servet 33, Tarrasa, Hispanujo interŝanĝos il. p.k. kaj pm. Korespondas esperante kaj hispane.

Giordano Bruno López, Amalia 347, Buenos Aires 8, Argentino, interŝanĝas 50-100 pm. uzitajn, ripetitajn aŭ ne, nur kun Skandinavio.

Anoj de klubeto deziras korespondi kun la tuta mondo : Esperanto-klubo C. Verwer, Raadhuisstr. 21, Breda, Nederlando.

S-ro Stig Moberg, Baazgat. 4, Mölndal, Svedujo, deziras korespondi kun hundoamantoj en la tuta mondo kaj interŝanĝi pk. kun hundobildoj.

Korajn Novjarajn salutojn al geamikoj sendas Winifred M. Rixham de Usono, Box 430, Sharon, Mass., Usono.


Letervespero okazos meze de marto. Bonvolu skribi multnombre el tuta mondo. Respondo certa. D-ro Anton Paul, grupestro, 70 Möhringer Str., Tuttlingen, Germanujo.

Esperanta Sanulejo estas fondota, kie oni povas vivi kaj lerni plejeble fariĝi centjara. Kiu sendos donacon por la sanulejo povos demandi laŭplaĉe. Volonte respondos D-ro Wegener, Hollestr. 1, Essen, Germanujo.

Turisma Servo : Rezervas malmultekoste hotelĉambrojn en okcident-Eŭropo, prizorgas gvidadon, turismajn prospektojn (afranku filatele). Loeckx, Konijnenperken 109, Brussel-Bosvoorde, Belgujo.

Mi deziras korespondadi kun la tuta mondo pri ĉiuj temoj kaj interŝanĝi poŝtmarkojn. Certe respondos. Skribu al Prof. Rosenfeld Arnold, Rchow Sireni 19, Cholon, Szykun Chadasz, Izraelo.

S-ro Ingvar Gustafsson, Box 1231, Grythyttan, Svedujo, deziras korespondi eksterlande pri fotografaĵoj.



FESTO DE BRITUJO

okazos en Bournemouth Junio 3a-17a 1951. Nepre vizitu la belan urbon de la pasinta 34a Kongreso.

Junio estas la plej bela monato dum la jaro en ĉi tiu belega mara regiono.

Anoncu vian viziton, kaj la Esperantistaro ja bonvenigos kaj helpos vin.

La urbo jam pretigis gravan programon. Por ĉiu informo skribu al

**INFORMATION BUREAU,
BOURNEMOUTH,
ANGLUJO.**